

V-4252/80 (1987)

1987 januaro

80a jaro

n-ro 973 (1)


aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio
nieuwe binnenweg 176 —

(en konsultaj rilatoj kun unesko)
3015 bj rotterdam — nederlando



EN LA
JUBILEAN JARON!



Vi trovos

abundon da belaj vortoj ĉi-numere, de Parizo ĝis Pekino, heroldantaj la Jubileon. Ŝajnas taŭge, ke nia revuo tiel aliĝu al la preskaŭ centjara tradicio de esperantistoj inaŭguri kaj celebri ĉiun feston kaj datrevenon per gaja piroteknikeca vortumado. Ni esperas, ke same vi enspiros inspiron el niaj paĝoj. Tamen, atentu la pledon de nia ĉepodia prezidanto kontraŭpaĝe, ke tiu jubilea inspiro fariĝu ankaŭ instigilo por jubilea laboro!

Krom belaj vortoj, ankaŭ troviĝas belaj faktoj ĉi tie. Ni rimarkigu, ke ĉiuj ses kontinentoj reprezentigas inter la novaĵoj en Loke-Fake-Persone; ke la vintromeza IS en Kolonjo, raportita sur paĝoj 6 kaj 7, estis preskaŭ duoble pli granda ol kutime; ke novaj eldonaĵoj denove postulis du paĝojn el la dudeko; ke la tri fakaj Esperantaj verkoj recenzitaj estas konstateble altkvalitaj. Do, ĉu ni ne rajtas festi iomete? Ĝis la februara!

Enhavo

- 1 Novjara mesaĝo de la Prezidanto de UEA: Ni interligu la manojn por jubilea kunlaboro
Iniciato pri la Jubilea Jaro (Flandra Esperanto-Ligo)
- 2 La Premio Zamenhof — Enkonduko al la Jubilea Jaro: Vetu pri Esperanto (Claude Piron)
- 5 Transdona parolado: "La mondo... komprenos viajn revojn kaj idealojn" (Grégoire Maertens)
Akcepta parolado: "Ni dividas ion profunde komunan: nian kredon je la homo" (Amadou Mahtar M' Bow)
- 6 Nova redaktoro de "Esperanto"
30a Internacia Seminario: "IS, ĉu ni povus ĝin forgesi..."
- 7 Junuloj kaj kulturo (Jarek Parzyszek)
- 8 Kvina CED-konferenco pri lingvo kaj komunikado: UN, Kanado kaj la kostoj de plurlingvismo
- 9 Zamenhof-festo en Pekino: "Ni disvolvu nian gloran tradicion!" (Hang Jun)
- 11 Recenzoj: *Enkonduko en la kategoriojn de Aristotelo* de Porfirio la Fenicia/trad. Evaldo Pauli (Gerrit Berveling); *Mil jaroj de kristana filozofio* de Evaldo Pauli (P. Janton); *Likenoj de okcidenta Eŭropo: ilustrita determinlibro* de G. Clauzade kaj C. Roux (Paul Neergaard); *The Artificial Language Movement* de Andrew Large (W.A. Verloren van Themaat)
- 14 Laste aperis..(novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 16 Kongresa Komunikado de la 72a UK en Varsovio
- 17 Nekrologoj; Loke-Fake-Persone (mallongaj novaĵoj)
- 19 Anoncetoj; Oficiala Informilo
- 20 Esperanto en radio

La kovrilo

Are, ope, individue — aŭ azie, eŭrope kaj afrike — la homoj sur nia kovrilo laŭ siaj diversaj manieroj partoprenos nian jubileon. La celitajn artikolojn vi povas trovi sur paĝoj 2 ĝis 7 kaj 9-10; ili kun konsistigas nian enkondukon al la Jubilea Jaro.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 UEA NL; **Telegram-adreso:** ESPERANTO ROTTERDAM.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 105 landoj.** Voĉlegata por blinduloj.

Redaktas: Mark Fettes

Abonprezo varias laŭlande (gld. 44,50; US \$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entrepreno de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%.

Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744.

Vicprezidanto (gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tôkyô, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.

Ĝenerala sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Francio; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.: tel. (1) 316-423.

Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cicina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Estrarano (gvidas la fakon pri financo): d-ro Victor Sadler, Livingstonelaan 304, NL-3526 HW Utrecht, Nederlando; tel. (30) 88 68 37.

Estrarano (gvidas internan agadon): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Ni interligu la manojn por jubilea kunlaboro

La Jubilea Jaro longe atendata nun staras antaŭ ni: Esperanto fariĝas centjara. Ke ĝi plene maturiĝis, tio estas evidenta jam delonge. Ne plu oni povas nomi Esperanton interesa eksperimento; ne plu oni povas priskribi nian lingvon kiel ambician provon al internacia kompreniĝo. Hodiaŭ Esperanto jam pruvigis sian taŭgecon en ĉiuj medioj, kaj estas nenio tro komplika, nenio tro subtila — se entute lingve esprimbla — kio ne povus esti esprimata en la Internacia Lingvo. Kiel lingvo, Esperanto plene sukcesis.

Ankoraŭ ne plene sukcesa estas la disvastigo de tiu lingve sukcesa fenomeno. La granda plimulto de la homaro neniam aŭdis pri Esperanto. Inter tiuj, kiuj scias, kio ĝi estas, ekzistas multaj homoj, kiuj ne plene komprenas ĝian grandan kapablon aŭ dubas pri la asertoj kaj pretendoj de tiuj, kiuj konas ĝin pli bone. Necesas dum la Jubilea Jaro atingi tiujn homojn, kiuj nenion scias pri Esperanto, kaj



konvinki ilin lerni la lingvon. Necesas atingi ankaŭ la skeptikulojn por forigi ilian skeptikecon. Necesas, entute, sukcesigi ne nur la lingvon sed ankaŭ la movadon por disvastigi tiun lingvon.

Okazoj tiel bonaj kiel la Jubileo ja venas malofte: necesas, ke ĉiu parolanto kaj uzanto de Esperanto streĉu sin ĝis maksimumo dum la Jubilea Jaro. Kion ni povas fari?

- Unue, ni povas instrui la lingvon, ekzemple per starigo de loka kurso, aŭ ni povas helpi aliajn tion fari.
- Due, ni povas verki artikolon aŭ artikolojn pri la lingvo kaj proponi ilin al loka aŭ nacia ĵurnalo aŭ gazeto.
- Trie, ni povas atentigi niajn amikojn kaj kole-

gojn pri Esperanto kaj ĝiaj atingoj, kaj klopodi konvinki ilin esplori ĝin pli profunde.

- Kvare, ni povas kunlabori en alia agado, loka aŭ nacia, por informi la publikon pri Esperanto.
- Kvine, ni povas subteni la Esperanto-movadon per aĉeto de libroj, per partopreno en kongresoj kaj konferencoj, kaj per financaj kontribuadoj al lokaj, naciaj aŭ internaciaj Esperanto-organizaĵoj.

Efika informado pri Esperanto postulas efikan informiĝon: ni devas mem koni nian lingvon kaj nian movadon. Necesas prezenti la faktojn, klare kaj sen troigo aŭ subtakso. Necesas zorge kaj saĝe esprimi la argumentojn por Esperanto. Do, la unua neceso, se ni volas klerigi la publikon, estas klerigi nin mem. Kaj kiam ni elpaŝos por montri Esperanton al la publiko, ni povos apogi nin sur la jamaj atingoj de la Esperanto-movado, sur la rekono, kiun ĝi jam ricevis ĉe Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, kaj sur la personaj spertoj de miloj da esperantistoj, kiuj profitis spirite, kulture, intelekto el sia utiligo de la Internacia Lingvo.

Fine, se ni deziras, ke nia lingvo de la paco efektive kreu pli pacan mondon, ni devas mem praktiki la pacon: nia lingvo plej rapide progresos se inter ni ni harmonie kunlaboros, kaj ĉiuj ligos inter si la manojn por komuna agado en la Jubilea Jaro.

Humphrey Tonkin

Iniciato pri la jubilea jaro

En ĝenerala kunsido de Flandra Esperanto-Ligo, okaze de ĝia pasinta kongreso, estis unuanime decidite organizi unutagan programon proksime de la 15a de decembro, 1987. Pro praktikaj kialoj, la plej ĝusta tago por ni estus sabato la 12a de decembro.

Tiu festaraĝo prefere estu organizita kiel eble plej proksime de la naciaj televidostacioj, kaj estu okazo por inviti kiel eble plej multe da eksterlandaj esperantistoj restantaj en la lando. Se diversaj Landaj Asocioj bonvolus organizi similan manifestacion en la sama tago, ni povus esperi atenton flanke de internaciaj televido- kaj radio-stacioj, aparte en Eŭropo fare de Eŭrovido, kiu eble interesiĝus pri po-kelksekunda elsendo de ĉiu lando.

Ni alvokas al ĝenerala pripensado de nia propono, cele al komuna agado, kaj dankas pro respondoj kaj reagoj. Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

En la ĉefsidejo de Unesko en Parizo, Francio, okazis la dua transdono de la Premio Zamenhof je la 16a de decembro. UEA starigis tiun premion en 1985, "por distingi elstarajn personecojn, kiuj laŭ la opinio de la tutmonda esperantistaro aparte kontribuis al la monda paco kaj internacia kompreniĝo." Kompreneble, alia celo estas altiri pli da atento al Esperanto per ĝia ligo kun ekstermovadaj gravuloj, kiuj laboras por similaj idealoj.

Ĉi-foje la premiito estis s-ro Amadou Mahtar M'Bow, la ĝenerala direktoro de Unesko. La jenaj paroladoj — enkonduka de Claude Piron, transdona de Grégoire Maertens, akcepta de s-ro M'Bow — reliefigas la kialojn por tiu elekto. Ili prezentiĝis antaŭ okdeko da ĉeestantoj, inkluzive de gastoj kiaj prof. André Martinet, unu el la plej eminentaj francaj lingvistoj, la pola ambasadoro (kiu salutis la kunvenon), funkciuloj de Unesko k.s. Ĉeestis entute kvin estraranoj de UEA, kvankam la prezidanto mem kaptiĝis en Novjorko pro kolegia tasko.

Jen, en la vortoj de Piron kaj M'Bow, vivaj bildoj de Esperanto el vidpunktoj en- kaj ekstermovadaj. En dek du jubileaj monatoj, al kiom da homoj ni povos porti tiajn perspektivojn?

Veti pri Esperanto

Ĉio komenciĝas en la jaroj 1870-aj en parto de la Cara Imperio, kiu nun estas Pollando. Bjalistoko ti-am estas kvarlingva urbo: oni parolas en ĝi pole, jide, ruse kaj germane. Junan knabon konstante trafas psike plej dolorigaj vundoj en tiu urbo disŝirata inter kvar komunumoj, kvar religioj, kvar lingvoj (kaj kvar alfabetoj), kvar malamoj. Tie ja multe pli ol aliloke, la simpla fakto vin esprimi etiketas vin. Pro ĝi oni tuj malestimos vin, aŭ solidaros. Ĉiu okazaĵo disvolviĝas sur fono de incitataj etnokulturaj identecoj. Se polo havas administran problemon, estus nepenseble, ke la rusa funkciulo parolos al li pole, sed nur kun amare premata furiozo kaj kun espero foje venĝi sin la polo ruse balbutos sian pe-ton.

Rilke iam diris, ke verkisto estas homo, kiu verkas, ĉar li ne povas ne verki. Juna Zamenhof starigis la bazojn de Esperanto samkiale: li ne povis tion ne fari. La kulturaj identecoj sentiĝis en Bjalistiko reciproke atakemaj. Kaj ili unuavice manifestiĝas per la lingvo kaj la maniero prononci. En tiaj kondiĉoj, uzi la lingvon de aliulo signifas ne nur konsenti al li



superecon, kontraŭ kiu etna digneco ribelas, sed ankaŭ trudi al si la penon akrobate gimnastiki gramatike, vort-uze kaj prononce, aŭ trakuri terenon plenan je kaptiloj kvazaŭ intence lokitaj, por ke oni pli facile falu en malsuperecon, kaj sentu sin ridinda.

Tiu malamika, humiliga etoso psike vundas Zamenhof, senteman knabon supere talentan. La situacio estas netolerebla. Necesas fari ion, por ke ĉiu, konservante la propran kulturon, povu komuniki sen tiuj ofendoj al la socikultura identeco, kiuj dramigas la ĉiutagan vivon bjalistokan.

Tiucele necesus disponi lingvon, kiu apartenu al neniu popolo, kaj kies strukturoj konformu kiel eble plej ĝuste al la natura fluo de lingva esprimado, lingvon, kiu ne devigu akrobati, lingvon, kiun povu regi homoj socie eĉ plej malaltrangaj. Tia lingvo ne ekzistas, ĉu? Negrave! Li ĝin iniciatos. Kun junula naiva fido, la knabo eklaboras, kunigante la sencdan logikon de infaneco, al kiu li ankoraŭ proksimas, kun la maniero agi de artisto, celanta belecon kaj neniam ĉesanta rafini la verkon plu kaj plu.

Ĉu, racie, li havas eĉ plej etan ŝancon sukcesi? Ni rezonu, se vi bonvolos, vetiste. Ĉu, cirkaŭ 1876, vi vetus, ke prosperos al tiu 17-, 18-jarulo, forperdita en fora urbo de fora lando (rilate al la tiamaj brilcentroj) atingi tian ambician celon: la naskon de nova lingvo?

Ni konsideru ties historion po-paŝe. Jen la patro de la juna viro sendas lin studi fore kaj igas lin promesi rezigni la lingvan ludadon. Ĉu ne estas realisme pensi, ke la knabo fine komprenos la absurdecon de sia projekto? Sed li persistas. Je la aĝo de 27 jaroj, li decidas publikigi la frukton de sia laboro. Li vizitas la eldonejojn, unu post alia. Sed frenezas neniu: neniu respondas jese. Proprakoste do li presigos etan broŝuron malriĉ-aspektan. Ne disponante reton da librejoj, kiun ŝancon li havos ĝin disvastigi? Ĉu vi vetus favore al tiu absolute nekonata ulo, tiakondiĉe?

Tamen la projekto varbas interesatojn, ĉefe en la rusa imperio. Revuo aperas en la naskiĝanta lingvo. Entuziasmigita, Tolstoj verkas por ĝi. Sed jen li malplaĉas al la ŝtato kaj la cara cenzuro malpermesas la revuon, solan ligilon inter la unuaj lingvanoj. Ricevinte tiun informon, ĉu vi vetus, ke vivplena lingvo laŭgrade naskiĝos el projekto plagita per tia fuŝa komenco?

Sed la vivo obeas alian logikon. En la kvin mondopartoj, homoj ekscias pri la lingvo kaj eklernas ĝin. Ridegas la lingvistoj, plej moke: ĉiu uzos la lingvon (ili diras) laŭ la propra maniero apliki gramatikon, kompreni la sencon de vorto, prononci; ne eblos interkompreniĝo. Al kiu iros via favora veto? Ĉu al la juna amato? Ĉu al la unuanimaj fakuloj?

Jes ja, ĉe la unua kongreso en Bulonjo-ĉe-Mar, en 1905, la novlingvuloj taŭge interkompreniĝas,

sed kial oni prenas serioze etan aron da stranguloj? El la vidpunkto de la parizaj salonoj, kiuj, tiutempe, difinas la valoron de ĉio por ĉiu, la nova lingvo ne montriĝas alloga. Svarmas en ĝi malfrancaj literoj kiel *k* kaj *j*, plus konsonantoj ĉapelitaj de ridinda supersigno. Ĝi aspektas forpuŝe, barbare. Tutmonde, la intelektuloj ĝin forĵetas. Ke al la iniciatinto mankas realismo, tion cetere pruvas lia stranga elekto de supersignaj konsonantoj troveblaj en neniu presejo, tiel ke, se oni volas aperigi ion tiulingve, necesas antaŭa fandigo de novaj prestipoj. Se bazi sin sur sana prudento, veti, ke tiu lingvo plu vivos, estas oferi monon al Sankta Neredono.



1914: milito ekflamas. Mortas Zamenhof. Faru viajn vetojn, gesinjoroj... Kiu vetos por tiu orfa lingvo, simbolo de egalecaj rilatoj en mondo, kiun regas la leĝo de l' ĝangalo?

Alvenas la jaroj 20-aj. Ĉe la Ligo de Nacioj, Irano proponas alpreni Esperanton por la internacia rilatado. Ĉiuj miregas! Kaj la grandaj potencoj pretiĝas al batalo. "Tiun proponon oni enterigu, ĝi estas danĝera por nia kultura supereco." Tiuj ŝtatoj estas riĉaj kaj influaj, iliaj delegitoj ne hezitas atenci la veron plej hontinde. Refoje oni mokas kaj forĵetas la projekton. Sincere, tiudate, ĉu sur ĝin vi metus la vetaĵon?

Jen ekregas Stalin kaj Hitler. Hitler juĝas Esperanton lingvo de juda konspiro, kaj de framasona; Stalin, de burĝaj kosmopolitoj. En la jaroj 40-aj, tiuj du havas preskaŭ plenan potencon super kontinenta Eŭropo. Esperanto estas malpermesita, ĝiaj librostokoj likvidiĝas, multajn el ĝiaj anoj oni enŝlosas koncentreje. En Japanio, Ĉinio, Hispanio,

Kontraŭ: *de maldekstre, André Martinet, Flora Szabó-Felső, Amadou Mahtar M'Bow, Grégoire Maertens. Supre: Claude Piron.*

Portugalia kaj aliaj landoj, la regantoj plenumas rilate al ĝi malpli perfortan politikon, sed tamen samdirektan. Diru al mi: kiun sekvon estus saĝe priveti tiuepoke, se ne la baldaŭan forpason de la lingvo?

Finiĝas la dua mondmilito, jen aperas la sistemo de samtempa interpretado. Tiu ŝajne solvas la komunikproblemon en kongresoj kaj konferencoj, sed fakte ĝi apenaŭ sukcesas maski evoluon, kiu ebligas al la angla superregi senkonteste. Evidentiĝas, ke en internaciaj rilatoj la angla emas monopoli. Ĝi estas la lingvo de inform-agentejoj, de multnaciaj kompanioj, de scienca eldonado same kiel de la muzikoj, laŭ kiuj, en la tuta mondo, dancas junularo usonece vestita.

Fronte al tia Goljato*, Esperanto estas Davido**, tiel eta, ke ĝi preskaŭ nevideblas. Konsiderante ambaŭ rivalojn, kiu, racie, vetos por la dua? Ĉu havus sencon la vetgajnon dependigi de lingvo, kiun subtenas neniua vasta socia movado, kiun financaj potencoj ignoras, kiun prisilentas la amaskomunikiloj, kiun la intelektuloj mokas, aŭ taksas mortnaskita? Konstante atakata jen politike, jen intelektually, ekde la publikigo, ĝi havas nek aliancanon, nek helpojn eksteran. En epoko, kiam furoras vidaĵoj mesaĝoj kaj bilda prezentado, ĝi ne disponas rimedojn por brile reklami pri si. Ĝi disvastiĝas nur pro la propraj, ne okulfrapaj, sed altvaloraj kvalitoj.

Kaj tamen, se juĝi laŭ objektivaj kriterioj — libroproduktado, partopreno en internaciaj kunvenoj, geografia areo kovrita de la anoncoj en la esperantlingva gazetaro, kvanto de esperantistaj eventoj, radiodissendado, nombro de lokoj, kie eblas

la lingvo, en kiun, tutmonde, tradukiĝas plej multe da kantoj. Oni uzas ĝin ĉiutage ĉe radio en landoj tiel malsamaj kiel Ĉinio kaj Pollando. Ĝi estas la ĉiutaga interkomprenilo de multaj paroj dunaciaj, kaj la gepatra lingvo de iu nombro da infanoj. Se objektive analizi la rilaton efikeco/kosto, ĝi montriĝas internacia komunikilo ege supera al la angla kaj al la sistemoj bazitaj sur tradukado kaj samtempa interpretado.

Se nun estus 1887, kaj vi tenus enmane la etan broŝuron de la perfekte nekonata dudeksepjaruloj, ĉu vi imagus, ke post iom malpli ol jarcento, la plej vasta internacia kongreso en la tuta historio de Ĉinio disvolviĝos tiulande en la lingvo, kies plej freŝa ĝermo jen montriĝas al vi? Ĉu vi tiujare vetus, ke en 1986 ne troviĝos unu tago sen, ie la mondo, esperantlingva kongreso, konferenco, kunsido aŭ kultura aranĝo? Tiel tamen la realo prezentiĝas.

Konstati, ke la raciaj vetoj konstante kontraŭas la faktan disvolviĝon de la okazaĵoj, estas pripensige. Se esplori pli profunde, evidentiĝas, ke la malfavoraj opinioj pri la estonteco de Esperanto baziĝas sur la sama, ĉiuforte ripetata misfaro: oni ne kontrolas la realon, oni ne rigardas, kiel Esperanto praktike funkcias kompare kun la aliaj sistemoj uzataj por interkulture komuniki. Krome, oni supertaksas la eksterajn premiojn kaj subtaksas la rolon de individuaj sentoj en lingvo-viviga kaj -disvastiga procezo. Kial Esperanto elmontras pli grandan viglon ol iuj lingvoj kun oficiala statuso, kiel la gaela aŭ la romanĉa? Ĉar homoj ŝatas krei, ludi, ĝui liberecon kaj rilati amike.



kontakti esperantiston, ktp —, oni rimarkas, ke, kun plioj kaj malplioj sekvantaj la fluon de la politika kaj ekonomia vivo, Esperanto neniam ĉesis laŭgrade disvastiĝi, kaj ke, precipe, en la lasta jardeko ĝia progresado rimarkinde akceliĝis.

En 1976, 30 universitatnivelaĵoj instruis ĝin; ĉi-jare, ili estas 125, t.e. pli ol kvarobligo en dek jaroj. Esperanto estas la lingvo de konsiderinda literatura produktado, kiu ne ĉesas ampleksiĝi. Ĝi estas

* *Giganto, en la Biblio.*

** *Etulo, kiu venkis la giganton Goljato.*

La strukturoj de Esperanto stimulas lingvan kreon, kiu subpremiĝas en la plimulto el la lingvaj teritorioj, ekde kiam infano fariĝas lerneano. Ili havigas al la lingvo ludan etoson, malestimatan de tiuj, kiuj prenas sin serioze, sed respondan al grava sopiro kuŝanta funde de nia psiko. Gramatike, vortfare, stile plej fleksebla, Esperanto elvokas senton de libereco en la maniero esprimi sin, kian samgrade allasas neniua alia fremda lingvo, kaj tio ĝueblas sen devi tede, multjare studadi. Kaj ĉefe, ĝi ebligas havi verajn kaj daŭrajn amikecojn trans la kulturaj limoj, kaj tiel ĝi kontentigas psikologian bezonon pli

profundan, ol oni ĝenerale imagas.

Estas fakto: en jarcento, Esperanto teksis sur la tuta terglobo abundon da amik-retoj, kiuj ligas unuj al la aliaj homojn el ĉiuj sociaj tavoloj, el ĉia medio kultura. Tiukampe, neniŭ rivalas kun ĝi.

Ĝi rajtus rigardi de alte ĉiujn, kiuj dum tuta jarcento vetadis kontraŭ ĝi, kaj ĉiufoje perdis. Sed ne estus laŭ ĝia stilo. Ĝi ne trudas sin. Al ĝi sufiĉas esti, kaj vivi. Havebla, por tiuj, kiuj pretas kunludi. Diskreta, eĉ nevidebla, por tiuj, kiuj preferas komuniki per pli kosta, pli nejusta, pli malsimpla sistemo.

TRANSDONA PAROLADO:

"La mondo... komprenos viajn revojn kaj idealojn"

Sinjoro Ĝenerala Direktoro, gesinjoroj!...

Laŭ unuanima decido de la Estraro de Universala Esperanto-Asocio, la ĉi-jara laŭreato de la Premio Zamenhof estas s-ro Amadou Mahtar M'Bow, ĝenerala direktoro de Unesko, kiu hodiaŭ estas nia honora gasto ĉi tie.

Kial ĉi tiu decido? Ĉar ni konsideras s-ron M'Bow homo kun vidpovo pri la estonteco. Ĉar ni trovas lin homo, kiu kuraĝe frontas la bazan problemaron de la nuna mondo. Ĉar li scipovas montri novajn vojojn al la solvo de problemoj, kiujn malmultaj kuraĝas alfronti rekte. Ĉar laŭ ni li pruvis sin homo posedanta aŭdsenton por novaj ideoj. Ni admiras la manieron en kiu li persiste defendas idealojn, fundamente gravajn por la homaro.

Kvankam Unesko jam en 1954 per rezolucio de sia Ĝenerala Konferenco en Montevideo rekonis, ke la idealoj kaj celoj de la Esperanto-movado kongruas kun tiuj de Unesko mem, s-ro M'Bow estis la unua altranga funkciulo de Unesko, kiu al tio dediĉis personan atenton. Ni dankas al li, ke li tra la pasintaj dek jaroj plurfoje trovis tempon interŝanĝi kun ni opiniojn pri niaj komunaj celoj.

S-ro Ĝenerala Direktoro, ankaŭ la adeptoj de la Internacia Lingvo trovas, ke la nunan mondon regas internacia komunika malordo, kiun ordo nomas nur tiuj kiuj profitas el ĝia maljusteco. Ni, same kiel vi, estas forte konvinkitaj ke ŝanĝoj sur tiu kampo estas fundamente necesaj kaj urĝaj. Ni estas, same kiel vi, por Nova Internacia Komunikado Ordo. Eĉ se vi nun ŝajnas en la okuloj de la mondo esti revulo de la speco de Zamenhof, ni estas konvinkitaj, ke tiu sama mondo pli aŭ malpli frue komprenos viajn revojn kaj idealojn. Ni esperas, ke tiu mondo komprenos la neceson atenti ankaŭ la lingvan dimension de la internacia kompreniĝo.

Grégoire Maertens
Vicprezidanto de UEA

Iom malĝoja, jes ja, ke oni tiel ofte rigardas ĝin alia, ol ĝi efektive estas, kaj ke oni plu preteratentas la altvaloran kontribuon, kiun ĝi povas alporti, interpopole, ne nur al amikeco kaj facileco, sed ankaŭ al pli justa rilatado kaj al la emo respekti ĉies lingvan dignecon.

Claude Piron

(Ĉi tiu estas traduko de franca originalo. Personoj, kiuj deziras la francan tekston, skribu al la aŭtoro — 25, Rannaux, CH-1296 Coppet, Svislando — sed ne retraduku francen la ĉi-supran esperantigon.)



AKCEPTA PAROLADO:

"Ni dividas ion profunde komunan: nian kredon je la homo"

"Sinjoro Prezidanto, kara Profesoro (Piron), gesinjoroj:

Antaŭnelonge mi legis historian verkon, kiu okupiĝas pri la 19-a jarcento. Unu fakto frapis min tiam, fakto kiu estis en tiu epoko memevidenta, sed kiu hodiaŭ ŝajnas al ni apenaŭ kredebla: letero sendita de Londono al Delhio povis bezoni ses monatojn por atingi sian ricevanton, kaj ĝia sendinto devis atendi unu jaron por ricevi eventualan respondon. Hodiaŭ tia letero farus la saman vojaĝon en du aŭ tri tagoj, telegramo en unu aŭ du horoj, telekso alvenus tuj. La tuta tero estas nun plektita en ĉiam pli densa reto de kontaktoj kaj informinterŝanĝoj, pere de kiuj kreskanta nombro da personoj sin trovas ligitaj al la mondo en ĝia tuteco, kaj ĉiutage spertas ĝian senliman diversecon.

Estas la ekesto de tia evoluo kiu sendube instigis antaŭ cent jaroj d-ron Zamenhof koncepti unikan komunikilon, lingvon neŭtralan, apartenantan nek al la propra nek al ajna nacio, kapablan ekde tiam funkcii kiel komuna komunikilo por ĉiuj nacioj... Atestanto de senfinaj kvereloj rezultantaj el la mis-

komprenoj, kiuj regis inter la malsamaj religiaj kaj lingvaj komunumoj, d-ro Zamenhof tiam iniciatis Esperanton, kiel komunan malfermilon kaj komprenilon, perilon de interpopola proksimiĝo kaj finfine — kiel ĝia nomo sugestas — de espero, de fido je mondo de universala frateco.

Kiel emfazis la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, pri kiu vi ĵus parolis, sinjoro Prezidanto, Esperanto nun definitive prezentiĝas kiel unu el la plej efikaj iloj de internacia interkompreniĝo, favoranta komunajn interrilatojn en ĉiuj sferoj de kulturo kaj scienco. Fine, la vivanteco de Esperanto manifestiĝas ankaŭ en tio, ke la Esperanto-movado estas movado de profunde humanisma inspiro. Ĝi estas movado kiu frontas ankaŭ pli vastajn demandojn, kiuj preteriras la nuran zorgon diskonigi la lingvon. Tiel, kunveno de fakuloj organizita pasintjare en la ĉefsidejo de Unesko fare de UEA, traktis temojn kiel: "Ĉu oni povas akcepti la modelon: unu lando, unu nacio, unu lingvo?"; "Kia estas la estonteco de minoritataj lingvoj?"; "Kion fari pri la lingvoj kiujn heredigis la kolonia sistemo?".

Do Esperanto lokis sin ĉe la kerno de plej vivanta kaj aktuala problemaro, tiu de la vojoj kaj metodoj por proksimigi la popolojn kaj kulturojn de la mondo per helplingvo kun universala celo, kiu ekzistas kune kun ĉiuj naciaj kaj regionaj lingvoj sen minaci iujn ajn; sed mi aldonu ankaŭ, ke tiu ĉi lingvistika aspekto integriĝas en multe pli vastan humanisman vizion, kaj sendube, apartigita de tiu humanisma vizio, la teknika aspekto de la lingvo ne permesus vere kompreni, kio estas la Esperanto-movado.

Jen kial, sinjoro Prezidanto, mi deziras ke Esperanto, kiun jam alprenis centoj da miloj da homoj en la tuta mondo, same kiel multnombraj universitatoj, estu ankoraŭ pli vaste uzata en la estonteco, kaj ke la esperantista komunumo, kune kun ĉiuj esperoj, kiujn ĝi portas en si, daŭre plivastiĝu en ĉiuj landoj.

Ĉi tiu premio estas sendube multe pli grava por mi ol multaj premioj, kiujn mi jam ricevis. Kiam mi unuafoje ĉeestis la kongreson de via asocio en Rejk-

javiko, mi estis profunde emociita pro la sentemo de la membroj rilate la plej premajn problemojn de nia epoko, pro ilia preteco kontribui pli vastskale, sendube, ol povis d-ro Zamenhof, al la proksimigo de ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj de la mondo. Ankaŭ vi, sinjoro Prezidanto, ne aŭskultas tiujn por kiuj ĉiu humanisma projekto fariĝas projekto utopia. Ĉar — kiel vi diris — la utopio, kiu inspiris d-ron Zamenhof, efektiviĝis kaj efektiviĝas.

Jen kial mi havas la plej altan respekton por ĉiuj, kiuj partoprenas en la Esperanto-movado, kaj mi ĉiam ĝojas povi interŝanĝi opiniojn kun ili, ĉar mi scias, ke ni dividas ion profundan: nian kredon je la homo, kiu ajn estas la koloro de lia haŭto, kiu ajn estas lia religio, kiu ajn estas la filozofio kiun li havas kaj, egale, kiu ajn estas la lando kie li loĝas.

Tial, sinjoro Prezidanto, je mia propra nomo same kiel je la nomo de Unesko, al kiu ĉi tiu honoro iras pere de mia persono, mi petas vin kredi ke, en ĉi tiu Jubilea Jaro de Esperanto, mi plene estimas la valoron de la premio kiun vi ĵus transdonis al mi kaj mi tre profunde vin dankas pro ĝi. Dankon al ĉiuj."


Amadou Mahtar M' Bow

30-A INTERNACIA SEMINARIO

"IS, ĉu ni povus ĝin forgesi.." (Amplifiki)

La Jubilea Jaro komenciĝis vere jubile en Kolonjo, FR Germanio, kie 350 gejunuloj el 23 landoj partoprenis la 30an Internacian Seminarion de Germana Esperanto-Junularo, de la 27a de decembro ĝis la 3a de januaro. Komence veraj klerigo-celaj seminarioj por kelkdeko da personoj, la IS-oj jam fariĝis la dua plej granda junulara renkontiĝo en Esperantujo. Aparte festan etoson ĉi-jare kreis la unuafoje movada temo "Internacia kulturo en praktiko". Venu kun ni travagadi la salonojn kaj tagojn de la kongreso...

* La prelegoj, laborgrupoj kaj diskutrondoj kadre de la temo estis pli multnombraj ol kutime, sed ta-



NOVA REDAKTORO DE "ESPERANTO"

Tiu ĉi numero de nia revuo estas la unua el la manoj de Mark Fettes, kiun la Estraro de UEA nomis por la redaktora posteno, vaka jam de kvin monatoj.

Nun 25-jara, s-ro Fettes pasigis la lastajn ses jarojn kiel studento pri biokemio en la universitatoj de Kembriĝo (Britio) kaj Brita Kolumbio (Vankuvero, Kanado). Esperanton li eklernis kiel dekelkjarulo en Nov-Zelando, laŭ instigo de sia onklo (konata irlanda esperantisto). En Kembriĝo li ekaktivis en la studenta klubo. Baldaŭ post sia transloĝiĝo al Vankuvero, li trovis sin enplektita en Lokan Kongresan Komitaton de la 69a UK — kiel kongresejestro, ĉar li fakte laboris meze de la kongresejo! En Roterdamo li kunredaktis la revuon ekde de sia alveno je la fino de oktobro.

Al la redakta taskaro s-ro Fettes alportas teknikajn kaj enhavajn spertojn el pluraj revuoj kaj novaĵbultenoj, precipe ne-esperantaj. Li preferas ne paroli pri siaj redaktaj principoj el teoria vidpunkto, sed lasi ilin evidentiĝi el la numeroj de la jubilea jarkolekto — atendante la koncernajn laŭdojn aŭ kritikojn de la legantaro...

men — almenaŭ en la unuaj tagoj — ŝajnis nesufiĉaj por tiom granda partoprenantaro. Viglis kurso pri dancado kaj tamburado afrikaj, areto de planlingvemuloj studadis volapukon, pluraj aliaj kursoj kontribuis al la temo. Dekkvino da programeroj elkreskis dum la semajno — aparta pruvo de bona sanstato de la priparolata internacia kulturo.



* La rokmuzikaj grupoj Amplifiki (samtempe sveda, dana kaj franca) kaj Persone (pure kaj nure stokholma), kun parte komunaj anoj, kernis la muzikan vesperon. La kantoj de Amplifiki, konataj de plimulto de la publiko, kuris de lipo al lipo dum la IS. Espereble saman sorton renkontos tiuj de Persone, kiu montris relativan profesiecon kompare kun aliaj Esperantaj muzikistaroj.

* La teatraj programeroj estis tre allogaj; el inter ili, la jam tradicia ĉe GEJ "pikniko" de F. Arrabal rikoltis multajn aplaŭdojn kaj ridojn, interalie pro la ekintervenado de vundema kakto, kies rolo tamen ne troviĝas en la originalo.

* Vekis apartan intereson prelego de d-ro Werner Bormann, inta sekretario de la Akademio de Esperanto, pri "la danĝera 15a regulo". Laŭ li, tiu regulo, kiu rajtigas la formadon de novaj vortoj en Esperanto el naciaj radikoj, malfermas la pordon al inundo de malinternaciaj, malfacile lerneblaj kaj nebezonataj vortoj. En la diskuto kiu sekvis, la granda plimulto de la ĉeestantoj ŝajne samopiniis, kaj aŭdiĝis kritikoj pri PAG, PIV, Karolo Piĉ kaj iu certa revuo, por nomi nur kelkajn...

* Plursimptoma gripeska malsano rapide disvastiĝis, verŝajne pro la manko de vitaminoj en la manĝaĵoj, pro la vetero kaj ĉefe pro la, tamen tre agrabla, silvestra interkizado. Pli ol kvinono de la seminarianoj konfesis publike sin malsanuloj... verdire rekorda seminario!

* La Silvestra Balo konsistigis, kiel kutime, la kulminon de la IS. Ĉi-jare, tamen, la kulminon de la Balo konsistigis ne la amasa kaj sendiskrimina kizado je noktomezo, sed la eltombiĝo de L.L. Zamen-

hof mem, horduonon pli frue, por heroldi la komencon de nova epoko — ne la Jubilean Jaron, sed la ekaperon de la unua kasedo de Amplifiki. Evidente la muzikgustoj de la Majstro restas harmoniaj kun la plej lasta modo.

* Al la kutima problemaro, kiun devas venki la organizantoj de ĉiu IS (programo, loko, financoj ktp), aliĝis ĉi-jare unu nova: je la 23a de decembro, komputilo en la germana ambasadejo en Varsovio paneis, kun sekvo, ke simile paneis la vizopetoj de ĉ. 20 poloj veturontaj IS-en. Ekkrizo! Tuj mobiliziĝis tri-pinta kampanjo de GEJ en Bonn, Kolonjo kaj Varsovio, bombardanta la burokratojn per leteroj, alvokoj, protestoj... La venko venis, tamen nur la 29an de decembro, kaj finfine ĉeestis nur duono el la planintaj poloj pro malfacilo akiri la flugbiletojn tiom rapide. Sed almenaŭ io pozitiva rezultis: la ambasadejo en Varsovio restas tute ŝokita per la urĝaj alvokoj flanke de Bonn, kaj supozeble malpli emos kaŭzi problemojn en venontaj jaroj...

* Ege sukcesis la nepartopreno en laborgrupoj kaj diskutoj. La IS iel malseminariigis. Ĉu oni retitolu ĝin, eble? Internacia Svatfesto? Internidea Saturnalio? (Bonaj proponoj estos plusendataj al GEJ.)

* La ĉambroj de la kongresejo ricevis sian tradicie satiran bapton: la ĉambro "Fina Venko" troviĝis, kompreneble, ĉe la plej alta etaĝo kaj ne estis atingebla, dum "Jarlibro 1986" lokiĝis ĉe la dua etaĝo laŭ la mapo, sed reale ne ekzistis ie ajn.

* Ankaŭ la "Centra Oficejo Funkcianta" plene meritis sian (iom pikan) nomon, pro la — almenaŭ surface — glata funkciado de ĉi tiu senprecedence vasta IS. Kvankam ties ĉefaj organizintoj okupiĝos pri aliaj taskoj fine de la Jubilea Jaro, nova ondo da junaj talentoj en GEJ sendube daŭrigos la ISan tradicion (kiu tiel restos ne nur isa sed asa kaj osa...) Sed por nun, ĝis Krakovo!

Kompilita de membroj de "Centra Oficejo Nefuncianta" (konata muzik-grupo...)

Junuloj kaj kulturo

La temo de la Jubilea Kongreso en Varsovio estos "Esperanto — cent jaroj de internacia kulturo". Ankaŭ ni junaj esperantistoj kreas tiun kulturon. Certe multaj el vi jam planas vojaĝi al Pollando: partoprenu do aktive! Proponojn viajn pri programkontribuoj atendas Jarek Parzyszek (LKKano por junularaj aferoj), DS-11 p.816, ul. Gagarina 33, PL-87-100 Toruń, Pollando.

UN, Kanado kaj la kostoj de plurlingvismo

"La ekonomiko de lingvo-uzo" estis la temo de la kvina jara konferenco de CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo), kiu okazis en Novjorko la 12an de decembro, 1986. Organizite de CED, la konferenco disvolviĝis ankaŭ sub la aŭspicio de la Traduka Fakto de Unuiĝintaj Nacioj kaj kun helpo de la Ŝtata Universitato de Novjorko (Kolegio Potsdam). Tiuj konferencoj restas grava ekstermovada manifestaĵo por esperantistoj, ĉar kutime — kiel ĉi-jare — la temo instigas diskutadon kaj konsciiĝon inter lingvaj fakuloj pri la aktualeco de lingvaj problemoj, kaj lasas ilin fari siajn proprajn konkludojn pri la taŭgeco de Esperanto kiel solvo. Plie, la referaĵoj liveras amason da utilaj informoj por tiuj, kiuj aktivas en Esperanto-medio kaj bezonas bazajn informojn por siaj argumentoj.

Du grandaj temoj superregisla ĉi-jaran diskutadon: la ekonomiko de lingvoj en Unuiĝintaj Nacioj kaj la lingva situacio en Kanado. Ariĝis en la konferenco funkciuloj de UN kaj parencaj organizoj, anoj de naciaj UN-misioj kaj universitataj studentoj kaj fakuloj: entute sesdeko da partoprenantoj.

Malfermante la konferencon, d-ro Humphrey Tonkin — la prezidanto de UEA, kaj samtempe di-



De maldekstre: Cestac, Boeglin, Meyer, Mahmoud, Cassar, Bertrand

rektoro de CED kaj reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj — atentigis, ke ĝuste UN estas bela modelo, ĉe kiu esplori la politikajn kaj financajn motivojn malantaŭ la elekto de tiu aŭ alia lingvopolitiko. Dum en nacioj kaj landoregionoj, li argumentis, lingvopolitikoj stariĝas per iom hazarda akumuliĝo de unuopaj decidoj en edukado, politiko, komerco ktp, ĉe UN la grandaj trajtoj de evoluo de lingvopolitiko estas klare videblaj en la specifaj decidoj de la Ĝenerala Asembleo. D-ro Tonkin tial esprimis sian bedaŭron, ke universitataj fakuloj ne pli intense studis la lingvan situacion ĉe UN.

UN: per teknologio el la babelaj turo?

La vortoj de D-ro Tonkin faris taŭgan enkondukon por la sesio pri UN, kiun malfermis s-ino Françoise Cestac, direktoro de la Traduka Fakto. Ŝi priparolis la nunan situacion ĉe UN, kun ties ses laborlingvoj, kaj notis la premon kaj komplikiĝon, kiujn kreas kreskantaj dokumentbezonoj kaj mal-kreskantaj monrimedoj. Laŭ ŝi la solvo, se entute ekzistas solvo, kuŝas en pli intensa utiligo de teknologiaj rimedoj kaj en pli bona direktado de la traduka procedo. La sekvaj parolantoj — s-ro Bruce Boeglin de la Interpreta Fakto, s-ro Nigel Cassar de la Terminologia Fakto, kaj s-ino Mary Meyer, estro de la Angla Servo en la Traduka Fakto, per detaligo pri la sistemoj uzataj en ilia laboro simile substrekis la multflankan aplikadon de teknikaj solvoj en Unuiĝintaj Nacioj.

La fina preleganto en la sesio pri UN donis super-rigardon pri la t.n. Programoj por lingvotrejnado, kiuj celas instrui la ses oficialajn lingvojn de la Organizo. Laŭ s-ro Youssef Mahmoud, proksimume 1300 oficistoj de UN nuntempe studas en la Programoj. La plej populara lingvo estas la franca. S-ro Mahmoud atentigis pri principo tre grava: ke la plej ekonomia solvo de lingva problemo ne estas ĉiam la plej justa. Tiel necesas en la lingvaj servoj de UN trovi ĝustan ekvilibron inter justeco kaj malmultekosteco.

Post la prezentoj fare de UN-funkciuloj, s-ro Maurice Bertrand — iama membro de la Komuna Inspekta Unuo de UN, kaj unu el la grandaj specialistoj pri UN-aj kostoj kaj efikecoj — proponis komenton. Li emfazis la gravecon de la lingvaj servoj ĉe UN, kaj ankaŭ la fakton, ke tiuj servoj estas neeviteble multekostaj. Tamen, li atentigis, mankas bona sistemo de kontado ĉe UN, kiu ebligus reale pritaksi la kostojn de lingvaj servoj, kaj ankaŭ fari komparojn inter la diversaj specialigitaj instancoj de la Organizo. Tion oni urĝe bezonas.

Konstateblas, ke inter la prelegoj pri la temo de UN troviĝis esence neniu, kiu respegulis la perspektivon de esperantistoj, krom tiu lasta rimarkigo de s-ro Bertrand. Apenaŭ necesas emfazi, kiom grava estas la neceso akiri komparan statistikon pri lingvaj kostoj ĉe UN kaj similaj organizaĵoj: ĉar ĝuste tio ebligus taksadon de la taŭgeco de aliaj solvoj, inkluzive de Esperanto.

Ĉu entute la fido je teknologio, kiun oni rimarkas en la supraj prelegotemoj, estas pravigebla el ekonomika vidpunkto? Eble ni rajtas suspekti, ke kvankam teknologiaj rimedoj povas iom plifaciligi tra-

dukadon kaj interpretadon, ili tamen neniam tuŝas la bazajn kostojn, kiuj fontas el salajrokostoj de homoj — ĉar ankaŭ maŝinoj bezonas siajn prizorgantojn kaj fakulojn — kaj la fundamenta problemo restas la tuta multlingva sistemo de UN. Eblas, fakte, ke tiu statistikomanko, pri kiu parolis s-ro Bertrand, fontas el nekonscia malvolonto agnoski la sen-elirecon de la nuna lingvopolitiko de UN... Jen, koncize, la eduka tasko kiun frontas UEA en siaj tieaj laboroj.



Kanado: escepta konscio kaj aktuala problemaro

Malgraŭ la ĝenerala regulo, ke landoj kaj regionoj formas siajn lingvopolitikojn iom senplane, Kanado estas escepte konscia pri lingvaj demandoj kaj do prezentas relative facile studeblan lingvan medion. Tion evidentigas i.a. la multaj artikoloj pri Kanado, kiuj aperas en la paĝoj de Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado, la revuo de CED. La aktualeco de la kanada problemaro speguliĝis en la fakto, ke diversaj kontraŭaj perspektivoj kaj proponoj prezentiĝis dum la konferenco.

S-ino Suzanne Pons-Ridler (Universitato de Nov-Brunsviko) kaj s-ro Ian Martin (Universitato York) ambaŭ kontraŭis la oficialan lingvopolitikon de la kanada registaro. Pons-Ridler proponis t.n. teritorian politikon: nome, ke oni celu ne dulingvismon ĉe unuopuloj, sed esence du lingvajn teritoriojn, en kiuj respektive la angla kaj la franca estu oficialaj. (Tia sistemo estus rekta inversigo de la oficiala kanadfedera politiko ĝis nun.) Martin levis demandojn pri lingvo-instruado por novaj enmigrintoj, kiujn, laŭ li, oni emas neglekti favore al kanadaj anglalingvanoj kiuj deziras lerni la francan.

Pro manko de la granda specialisto pri kanada lingvoekonomiko, s-ro François Vaillancourt, pro malsano, la tasko defendi la nunan lingvopolitikon de la kanada registaro iris al s-ro Jean-Claude Corbeil, ĝenerala sekretario de la Internacia konsilio pri esploro kaj studo de fundamenta kaj aplikata lingvistiko, Montrealo. Ankaŭ s-ro Alain Landry, asista ŝtata vicsekretario de Kanado, kvazaŭ reprezentis la

oficialan starpunkton en sia referaĵo, kiu pritraktis la utiligon de aŭtomatigita tradukado en Kanado.

Lingvo-industrio kaj lingvo-ekonomiko

La fina sesio de la tago traktis diversajn aspektojn de la ĝenerala temo de la konferenco. Prof. Mirosław Krzak prezentis kelkajn aktualajn problemojn de maŝintradukado; poste s-ino Carol Thompson, kiu respondacas pri enkonduko de nova teknologio en la lingvajn servojn de UN, aldonis sian komenton. S-roj Apollo Wu (Traduka Servo de UN) kaj Harald Hille (Terminologia Sekcio, UN) pritraktis la ekonomiajn aspektojn de supersignoj, donante apartan atenton al la maŝina prilaboro de tekstoj en la ĉina kaj en Esperanto. S-ro Nigel Holden, de la fakto pri komercaj kaj administraj studoj en la Universitato de Salford, Britio, esploris la problemon de lingvaj diferencoj en la internacia agado de entreprenoj, kaj s-ino Sonia Barinas referis pri la kostoj de kvalito en komerca tradukado. Fine, s-ino Margareta Brown, estro de la fakto pri interpretado kaj tradukado en la Universitato Georgetown, Usono, prezentis kelkajn bazajn informojn pri kompensado de profesiaj interpretistoj tra la pasinta trideko da jaroj.

Post la konferenco, UEA gastigis ĉiujn partoprenantojn kaj aliajn amikojn el la sekretariato de UN kaj la UN-misioj ĉe Akcepto honore al Zamenhof-Tago. Ĉeestis preskaŭ centoj da homoj. La partoprenantoj aŭdis mallongan saluton senditan de la pola ambasadoro, kunlige kun la UK en Varsovio en 1987, kaj raporton pri la agado de UEA ĉe la sojlo de la Jubilea Jaro.

ZAMENHOF-FESTO EN PEKINO

"Ni disvolvunu nian gloran tradicion!"

Posttagmeze de la 14-a de decembro 1986, pli ol 400 ĉinaj esperantistoj en Pekino partoprenis en la memora kunveno solene okazigita komune de Ĉina Esperanto-Ligo, Pekina Esperanto-Asocio, Scienc-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj Pekina Veterana Esperantista Asocio. En la granda halo de la kunvenejo regis gaja festa atmosfero. Super la podio alte pendis kolora portreto de d-ro Zamenhof, ambaŭflanke pendis verdaj standardoj de Esperanto, meze estis rubando el verda ŝtofo sur kiu maljuskle tekstis "127-a Zamenhofa Festo en Pekino". Ĉirkaŭ la podio ĉarmis floroj kaj aliaj verdaj plantoj en potoj. La printempa etoso en la kunvenejo forgesigis al la ĉeestantoj la frostan vintron en Pekino.

S-ro Zhen Heyao, membro de la konstanta komi-

tato de Ĉina Esperanto-Ligo kaj vicprezidanto de Pekina Esperanto-Asocio, prezidis la kunvenon.

S-ro Xiu Shanshu, vicedirektoro de la gazeto *El Popolo Ĉinio*, membro de la konstanta komitato de Ĉina Esperanto-Ligo kaj vicprezidanto de Pekina Esperanto-Asocio, faris ĉefan paroladon sub la titolo "Por la Centjara Jubileo de Esperanto". En sia parolado li retrorigardis la klopodojn fare de ĉinaj esperantistoj en la pasintaj pli ol 80 jaroj depost la enkondukiĝo de Esperanto en Ĉinion. Li detale parolis pri la gravaj taskoj, nun starantaj antaŭ la ĉinaj esperantistoj. Fine de sia parolo li alvokis, ke ĉinaj esperantistoj en diversaj lokoj unuiĝu kompakte inter si kaj unuiĝu kun gesamideanoj en diversaj landoj de la mondo, kune klopodu por la brila perspektivo de Esperanto.

Al la kunveno ĉeestis honore kelkaj gravaj personoj kaj famaj sciencistoj, kaj ankaŭ ses junaj gesamideanoj venintaj el Japanio, Maroko, Kongolando kaj Tanzanio, kaj nun studentaj en Pekino. Iuj el ili parolis aŭ laŭtleĝis sian poemon omaĝe al D-ro Zamenhof.

Cheng Haosu, vicurbestro de Pekino kaj honora prezidanto de Pekina Esperanto-Asocio, faris tre kuraĝigan paroladon. Li diris:

"Karaj gekamaradoj, Hodiaŭ ĉinaj esperantistoj en Pekino solene kunvenas ĉi tie por memori la 127-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro Zamenhof, la kreinto de Esperanto, kaj samtempe celebri la baldaŭan centjariĝon de Esperanto. Invitite ĉeestante vian kunvenon, mi esprimas al vi, karaj gekamaradoj, elkoran gratulon!

"Antaŭ cent jaroj, D-ro Zamenhof kreis Esperanton kun la celo liveri lingvan komunikilon por strikte kunligi en la mondo ĉiujn ŝtatojn kaj naciojn kun malsama kultura fono. En la pasintaj cent jaroj, la homa socio travivis grandegan ŝanĝiĝon kaj gajnis rimarkindan progreson. Laŭ mi, tiu ŝanĝiĝo-kaj progreso estas iusence atesto, ke la idealo de Zamenhof estas vivipova, ke lia tiama espero pri la solidareco inter homoj neniel estas ia utopia penso. Lia malproksima vido kaj saĝo en kreado de Esperanto kaj lia sinoferemo en batalo por la realigo de la nobla idealo estas admirindaj, respektindaj kaj eterne memorindaj por ni.

"Ni tre ĝojas, ke nelonge post sia apero, Esperanto jam enkondukiĝis en Ĉinion, aperis ĉinaj esperantistoj. Por ĝia disvastigo kaj disvolvo, ĉinaj esperantistoj faris elstarajn kontribuojn. La 71a Universala Kongreso de Esperanto okazinta ĉi-jare en Pekino ja estas elokventa simbolo. Ĝi montris, ke Esperanto gajnis grandegan progreson ankaŭ en Ĉinio, kie prosperis la civilizo jam en la antikveco, kaj ke la ĉinaj esperantistoj per siaj klopodoj skribis fierindan paĝon en la centjara historio de Esperanto. La maljuna generacio de ĉinaj esperantistoj siatem-

pe ligis la disvastigon de Esperanto kun la naciŝaniga afero de la ĉina nacio kaj gajnis grandan sukceson. Kaj la nuna juna generacio de ĉinaj esperantistoj devas ligi la daŭran disvastigon de Esperanto kun la afero de la reformado kaj malfermo de Ĉinio kaj la unuiĝo kaj kunlaboro de la homaro kaj klopodi kiel eble plej energie por gajni ankoraŭ pli grandajn novajn sukcesojn!

"Karaj gekamaradoj, venontjare ni celebros la centjaran jubileon de Esperanto. Mi esperas, ke niaj Esperantaj asocioj kaj niaj esperantistoj multe propagandos por helpi pli da homoj koni la centjaran historion de Esperanto, inspiri pli da homoj lerni kaj posedi Esperanton. Ĉinaj esperantistoj devas disvolvi la gloran tradicion de la pasintaj pli ol 80 ja-



roj, kontribui al la gesamideanoj en la internacia socio pli da praktiko, t.e. sukcesoj. Profitante la hodiaŭan okazon mi antaŭgratulas kaj deziras, ke venontjare la centjara jubileado de Esperanto en Pollando, Ĉinio kaj ĉiuj lokoj de la mondo fariĝu grandioza festo de solidareco inter la homoj kaj paco en la mondo!

"La idealo de Zamenhof kuraĝigu nin marŝi antaŭen!

"Esperanto helpu nin realigi la grandan solidarecon de la tuta homaro en la nova tempo!"

La grava parolado de la vicurbestro de Pekino refoje vidigis al ni la favoran sintenon de la ĉina registaro al Esperanto. Kun tia subteno kaj helpo ĉinaj esperantistoj certe povos fari ankoraŭ pli grandajn kontribuojn al la internacia Esperantomovado, al la realigo de la nobla idealo de d-ro Zamenhof, al la afero de homa progreso kaj monda paco.

En la kunveno maljunaj esperantistoj de Pekina Veterana Esperantista Asocio ĥore kantis en Esperanto la de ili mem komponitan Kanton pri Verda Stelo. La junaj esperantistoj de Pekina Esperanto-Asocio faris la Unuan Oratoran Konkurson sub la temo: Mi kaj Esperanto.

Hang Jun

Bona iniciato meritanta pli da zorgo

Enkonduko en la kategoriojn de Aristotelo, Porfirio la Fenicia (232-305). El la pragreka trad. Evaldo Pauli. Chapecó: Fonto, 1983. 79p. 21cm. Prezo: 7,80 gld.

Mi komencu per kelkaj bedaŭrindaj malfortaĵoj (foje eĉ rektaj eraroj) de la verko.

Unue, la aŭtoro (kaj ege prave!) plurfoje citas en siaj enkonduko kaj klarigoj helenajn vortojn, kelkfoje eĉ plenajn frazojn. En tio estas nur bedaŭrinde, ke en ili svarmas tiom da preeraroj. Por iom doni impreson: mi trovis sur unu sola paĝo (p.15), ke el 15 helenaj vortoj ses estis mispresitaj. Tio nepre estas tro en verko celanta ekestigi seriozan sciencan okupiĝon en Esperanto pri filozofio. Se tiu ĉi verko atingus sian celatan publikon, oni ja devus povi studi per ĝi; kaj tio postulas, ke la citaĵoj estu plej detale fidindaj.

Alia malfortaĵo estas la Esperanta lingvaĵo: unuflanke, la terminologio ankoraŭ ne estas fiksita, aliflanke komprenebla en fako ĉi-lingve tiel juna. Tio nur neprigas, miakomprene, la bezonon de klara terminologia listo ĉe la fino, por uzo de la studentoj. Ekz. "predikato", "ekspozicio" k.s. ricevas signifojn, kiujn en multaj naciaj lingvoj oni renkontas, sed kiujn eĉ PIV ne registras. Plurfoje ankaŭ gramatikaj eraroj (aŭ komposteraroj?) komplikigas la fluan legadon.

Sed tamen, malgraŭ ĉi tiaj makuloj, nepre temas pri verko gravega. Ne nur historie: Aristotelo, kvankam li fondis la logikon kiel sciencon, ne titolis ĝin tia — tion la unua faris Porfirio, kies komentario iĝis vere klasika tiuterene. Pli poste, Boecio (kies *Konsolo de la filozofio* antaŭnelonge same aperis en Esperanto, en traduko de Goodheir) tradukis la Porfirian enkondukon en la latinan, kaj pere de ĉi tiu ĉirkaŭvojo, Porfirio kaj lia klarigado pri la Aristotela logiko fariĝis la bazo de la mezepoka eŭropa logiko. Sed la verko ankaŭ memstare indas je pristudo: temas pri unu el la unuaj komentarioj vere seriozaj, kiujn oni faris en la okcidenta filozofio.

Se en Esperanto estiĝos studinda literaturo filozofia, tiam en ĝi ne rajtos manki tiaj bazaj verkoj kia tiu ĉi de Porfirio. Tiel prave rezonas la tradukinto, Evaldo Pauli. Li tradukis la verkon tre formfidele (eble foje iom tro), tiel ke pere de lia traduko ankaŭ nefakuloj povas ĝin funde ekkoni: kaj tio nepre me-

ritas grandan laŭdon! Kaj, ĉar la temo estas por ne-filozofo sufiĉe komplika, li aldonis ampleksajn klarigojn en la formo de enkondukaj ĉapitroj kaj multaj notoj paĝosube. Kaj en tiuj klarigoj inde reliefigas liaj pedagogiaj kvalitoj: li trafe scias analizi kaj klare prezenti.

Do, entute, malgraŭ pluraj lingvaj malglataĵoj (el kiuj parto estus evitebla, parto estas esence propra al la noveco de tiu entrepreno), temas pri verko nepre aĉetinda, leginda, aŭ — pli ĝuste! — studinda. Intertempe la Biblioteko de Filozofio Fonto jam pliriĉiĝis per pluraj aliaj titoloj. Ni nepre devas sekvi ties evoluon per okuloj tre atentaj. Ĝi meritas subtenon de la tuta esperantistaro.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Admirinda panoramo de okcidenta pensado

Mil jaroj de kristana filozofio, Evaldo Pauli (1924). Florianopolis (Brazilo): Eldonejo Simpozio, 1985. 260p. 22cm. Prezo: 36,90 gld.

Jen verko taksenda kiel unu el la plej gravaj eldonaĵoj en Esperanto dum la lasta jardeko, ĉar ĝi rigardas trans la limojn de Esperantujo al vasta publiko de interesiĝontoj en ĉiuj landoj. Ĉiu studento pri



Evaldo Pauli: profesoro kaj aŭtoro pri filozofio, kaj prezidanto de Filozofia Asocio Tutmonda (FAT).

okcidenta filozofio, kristana teologio, eklezia historio kaj historio de ideoj je universitata nivelo — sed ankaŭ la inteligenta leganto deziranta informiĝi pri la evoluo de la okcidenta penso aplikita al religio — devas nepre konatiĝi kun tiu fundamenta, preskaŭ enciklopedia verko ampleksanta panoramon de kristana filozofio inter la jaroj 200 kaj 1200.

Evaldo Pauli, profesoro de filozofio en la federacia universitato Sankta Katerina en Florianopolis, jam publikigis diversajn librojn portugallingve. Lastatempe aperis sur Esperantobretoj du epistemologiaj verkoj, *Rekta pensado* (1983) kaj *Pri dubo*

kaj certeco (1984), en kiuj li prezentas praktikan kaj dinamikan koncepton de filozofio kaj didaktike el-laboras metodon por racia kaj kompleta mensesdu-kado. Tiun ĉi metodon karakterizas racieco kaj logi-keco, sed la aŭtoro bone konscias pri la danĝeroj de totalisma raciismo. Tial li kapablas ellabori flekse-blajn kaj objektivan pensmetodon, kiu konsistigas sanan enkondukon al filozofio. Tiel li montriĝas samtempe filozofo kaj pedagogo, du kvalitoj kiuj nature unuiĝas ĉe la plej eminentaj en ĉiu kategorio. Tiuj kvalitoj ekzempliĝas okulfrappe en lia jena ver-ko.

Kiel filozofo li kritike ekzamenas, t.e. objekte klarigas, la filozofiajn antaŭsupozojn de la kristana teologio. Nek la religia "sperto" — la psika kontak-to kun Dio — nek la kredo en si mem interesas la fi-lozofon, kies sola ilo kaj alirvojo al fenomenoj estas la racio: nur la intelektaj implicaĵoj kaj la raciaj procezoj, per kiuj la kredo elvolviĝis. Konsekvence Pauli okupiĝas pri la kristanaj filozofoj, t.e. pri tiuj kristanoj, kiuj provas racie konstrui sian koncepta-ron kaj sistemon en kongruenco kun la Revelacio kaj la fido. Ne koncernas lin la kristanaj mistikuloj, laŭ kiuj kono kaj scio ne doniĝas nure kaj necese pere de intelekto kaj racio sed ankaŭ per ne-raciaj koni-loj ekster la sfero de filozofio. Tamen en kelkaj ka-zoj konfuzo povas estiĝi inter filozofio kaj teologio, kaj pro tio la aŭtoro fojfoje atentigas pri la distingo, kun granda utilo kaj al la teologo kaj al la filozofo.

Kiel pedagogo Pauli admirinde ordigis la grande-gan haveblan materialon, kies kompilado postulis ne nur gigantan laboron sed ankaŭ akran klarvide-con kaj konstantan atenton al la fundamentaĵoj de ĉiu ekzamenita verkisto. Pli ol 73 filozofoj-teologoj estas analizitaj en siaj ĉefaj trajtoj kaj karakterizitaj per sia propra problemaro, lokitaj en sia historia kunteksto, rilatigitaj unu al la aliaj por montri, kiel pensofluo formiĝas, ilustritaj per mallongaj citaĵoj kaj kritike diskutitaj de la aŭtoro. La famaj nomoj — Atenagoro, Origeno, Tertuliano, Augusteno, Boecio ktp. — estas reliefigitaj kaj la grandaj fluoj — platonismo, nominalismo, realismo, skolastiko, ktp. — same kiel la bazaj konceptoj estas klarigitaj en densaj paragrafoj de altnivela popularigado.

La substanco de la ĉapitroj estas tiel riĉa, ke mal-longa indekso de la menciitaj konceptoj estus konsi-linda, kaj la bibliografio, bazita sur la greka kaj lati-na Patrologio de Migne, estus pli facile trarigarde-bla, se ĝi estus listigita je la fino de la verko kun pli precizaj indikoj. Konkluda sinteza ĉapitro, eĉ kon-ciza, certe plifortigus la impreson, ke la verko kon-sistigas tuton kaj ke la lasta ĉapitro ne elvaporuĝas en la aeron. Tiu manko tute ne damaĝas la unuecon de la libro sed atendigas daŭrigon: ni esperu, ke Pauli aŭ same kuraĝa kompetentulo verkos la kon-traŭparton ampleksantan la aristotelan fazon de la

kristana filozofio ĝis la Reformacio. Eble iu iam di-ros, kio el ĉio ĉi restas nun en la kristana filozofio.

Konsiderata kiel esperantaĵo, la interna valoro de la verko grandparte eklipsas la formalajn malper-fektaĵojn. Tiuj tamen ekzistas ne nur en la formo de preseraroj, sed ankaŭ la lingvo kelkfoje deflankiĝas de la gramatiko kaj montras embarason pri la espe-rantigo de kelkaj personaj nomoj. Tiuj difektetoj ne tro reliefiĝas pro la belaspekta tipografia kaj eldo-nista tekniko. Tamen ili estas nepre forigendaj, por ke la venontaj volumoj en la projektita *Enciklope-dio pri Filozofio* plene konformiĝu al la normoj de internacia scienca eldonado.

P. Janton (Francio)

Monumenta botanika verko

Likenoj de Okcidenta Eŭropo. Ilustrita Determinli-bro, G. Clauzade kaj C. Roux. Saint-Sulpice-de Royan (Francio): 1985. ISSN 0154 9898. Laboraĵo de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Mari-no (AIS). 893p. 405 figuroj (kun multaj subfiguroj). Prezo: 248,40 gld.

Tiu ĉi libro markas elstaran eventon en la aplika-do de Esperanto en la sciencoj. Ĝi estas verkita tute en la Internacia Lingvo, nur la antaŭparolo estas pa-ralele ankaŭ en la franca lingvo.

La libro konstituas ilon por determini entute ĉ. 330 genrojn kaj 5000 speciojn de okcidenteŭropaj li-kenoj. Likenoj estas kategorio de fungoj, plejparte askomicetoj (saksporfungoj), kiuj vivas en deviga




Fig. 48 - Makuloformaj (*Pertusaria amara*).



Fig. 49 - Kapoforma (*Hypogymnia tubulosa*).



Fig. 51 - Fendetoformaj (*Parmelia sulcata*).

biologia kunvivado, tiel nomata simbiozo, kun al-goj, alia kategorio de malgrandaj, primitivaj plan-toj. La aŭtoroj, ambaŭ perfektaj sciintoj de la In-ternacia Lingvo, kritike reviziis la taksonomion (sistematikon) de la likenoj, starigante novajn tak-sonojn (t.e. genroj kaj specioj), el kiuj genro (kun

tri specioj) ricevis la nomon *Zamenhofia*; plue ili ŝanĝis la nomon de multaj specioj konforme al la internaciaj botanikaj nomenklaturreguloj kaj laŭ la konceptoj de la aŭtoroj pri la sistematiko de la likenoj. Tiu ampleksa kompetenta monografia prilaborado de tiu ĉi interesa grupo de duoblaj organismoj rezultigis, ke la libro estas simple nemalhavebla al likenologoj: ili *devas* ĝin havi ĉe la mano, eĉ se ĝi estas skribita en lingvo fremda al ili. Por iom faciligi al nesciantoj de la Internacia Lingvo la uzadon de la libro, la aŭtoroj provizis liston de oftaj vortoj esperantlingvaj, tradukitaj en la francan, anglan kaj germanan, kaj aldonis liston de nacilingvaj Esperanto-vortaroj.

La faka lingvaĵo de la libro estas tute kontentiga; la libro iasence estas terminaro likenologia en la praktika uzo. Estus tre utile, se la aŭtoroj volus verki sistematike aranĝitan terminaron kun difinoj kaj kun tradukoj en la anglan, francan kaj germanan, kaj kun la necesaj indeksoj en la kvar lingvoj.

Tiu ĉi ĝis nun en nia literaturo plej grava botanika verkaĵo, bazita sur originalaj esploroj, estas dokumento tiel grava rilate al la aplikado de nia lingvo en la scienco, ke ĝin devas posedi ĉiu iom serioza biblioteko de Esperanto-literaturo, kaj ĝi ne devas manki en kiu ajn ekspozicio pri la Internacia Lingvo en la praktiko.

Paul Neergaard (Danlando)

Planlingvoj el ekster movada perspektivo

The Artificial Language Movement, Andrew Large. Oxford: Basil Blackwell; Novjorko: Andrew Deutsch, 1985. 240p. 24cm. ISBN 0 631 14497 8. Prezo: 105,00 gld.

Ĉi tiu libro plenumas la tri ĉefajn postulojn, kiujn oni rajtas meti al homscienca publikaĵo: ĝi estas bazita sur sufiĉe da dokumentoj por havi almenaŭ superrigardon pri sia temo, pri ĉiuj aspektoj de la sociologio kaj kulturhistorio de la planlingva movado, ĝi estas inteligente ellaborita kaj strebas unue la veron, ne propagandon por iu ideologio. Por dokumenti sin por tiu libro la aŭtoro kontaktis diversajn planlingvajn asociojn.

Pli ol la pli multaj planlingvaj historioj verkitaj de planlingvanoj, la libro metas planlingvojn en ĝeneralan socian kaj kulturan kadron. Tial ĝi estas tre instrua, eĉ por planlingvano bone konanta la historion de planlingvoj. Almenaŭ mi lernis el ĉi tiu libro multon, precipe pri la pli frua planlingva historio. Ĝi donas ekz. tre vivan bildon de la 17a-jarcenta planlingvaŭtoro Wilkins. Ĝi limigas sin al la ĉefaj

planlingvoj. Laŭ kompleteco pri la individuaj planlingvanoj ĝi ne povas konkurenci kun ekz. *Historio de la mondlingvo* de Drezen, sed ĝi legiĝas multe pli agrable.



René Descartes (1596-1650): la fama franca filozofo estis influa instiganto de planlingvaj projektoj.

Koncerne la modernajn planlingvojn Large interesiĝas pli pri la sociologio kaj kulturhistorio de la planlingvoj ol pri iliaj lingvaj detaloj. Laŭ la teknika-interlingvistika flanko ĉi tiu libro ne povas anstataŭi ekz. la (bedaŭrinde nederlandlingvan) *Vijf kunsttalen* (Kvin planlingvoj) de Manders aŭ plurajn librojn de Ric Berger. Sed oni ne povas atendi trovi ĉiujn valorajn informojn en unu libro. Pri Esperanto kiel lingvo troviĝas eĉ kelkaj nepraj eraroj. Sur p.120 li mencias, sekvante Burney, "malsanulejo", sed ne la ankaŭ ekzistantan "hospitalo", kaj "radaro" nur kun la signifo "rad-ar-o". Li estus devinta konsulti nur la Plenan Ilustritan Vortaron, la norman vortaron de Esperanto, por konstati, ke en Esperanto ekzistas *hospitalo* kiel *radaro* en sia internacia signifo.

Ankaŭ koncerne la aliajn planlingvojn li faras kelkajn erarojn. Peano kaj De Wahl neniam estis idistoj (p.133), kvankam De Wahl publikigis artikolojn en la Ida revuo *Progreso*. Mi bedaŭras ankaŭ la nemencion de Loglan. Tiu planlingvo, kun gramatiko inspirita de la simbola logiko, havas tre interesajn trajtojn el teoria vidpunkto, kvankam ĝi ne estas malproksima de kompleta nepraktikebleco kiel komunikilo.

La personon de Zamenhof Large pentras simpatie. La nunajn staton kaj evolutendencon de la Esperanto-movado li pentras esence ĝuste, tamen iom tro malfavore. Li pravas, ke Esperanto nun regresas en Okcidenteŭropo, sed mondscale UEA kreskas la lastajn jarojn. En la sekcio "Esperanto kaj internaciaj organizaĵoj" (p.98-100) mankas mencio de la Eŭropa Parlamenta Esperanto-Grupo.

Large finkonkludas, ke la angla lingvo estas la plej verŝajna estonta mondlingvo. Por tio li donas ĉefe tri argumentojn: 1) La angla lingvo iĝos mondlingvo pro la premo de la faktoj; 2) Li dubas pri la kultura matureco de Esperanto por la rolo de mondlingvo; 3) Esperanto havas fundamentan obstaklon sur sia vojo al la mondlingveco: ĝin devus lerni multaj homoj por fari ĝin mondlingvo kaj dum ĝin lernas malmultaj homoj, ĝi donas al tiuj homoj malmultan kompenson.

La unua argumento estas la plej forta. Mi mialflanke ne pretendas povi pruvi science, ke Esperanto iam estos la dua lingvo de ĉiuj homoj.

Rilate al kultura matureco de Esperanto, Large alprenas ambiguan sintenon. Kvankam li citas *The Esperanto Language as a literary medium* (La lingvo Esperanto kiel literatura perilo) de Margaret Hagler en la ĉapitro pri Esperanto, en la fina ĉapitro

"Perspektivoj por internacia lingvo" li citas la opiniojn de homoj, kiuj havas verŝajne nenian empirian konon de la uzado de Esperanto fare de ĝiaj plej bonaj stilistoj.

Se la tria argumento estus valida, oni povus pruvi tute analoge, ke nenia revolucio povus iam ajn sukcesi. Sed ĉar revolucioj ja okazas, simile estas imageble, ke iam la popoloj tiel konvinkiĝos pri la avantaĝoj de Esperanto kiel internacia komunikilo, ke ili akceptos ĝin kiel veran mondlingvon.

Tamen, en scienco tiel ideologie ŝargita kiel la interlingvistiko estus danĝere preni konon nur de la verkoj de siaj samideanoj. Tial ĉi tiun libron mi varme rekomendas al ĉiu planlingvano kiu serioze studas la historion kaj teorion de la planlingvoj, precipe ĉar tiu libro estas inteligenta kaj bone dokumentita kaj sincere serĉas la veron.

W.A. Verloren van Themaat (Nederlando)

Laste aperis...

Aŭstralia-Esperanta vortaro/Australian-Esperanto dictionary (1983), R. Harry kaj V. Guelting. Bentley: Aŭstralia Esperanto-Asocio, 1985. 26p. 21cm. ISBN 0 9595336 5 6. Unudirekta vortaro de la aŭstralia dialekto de la angla. Prezo: 3,00 gld.

Bulgara nuntempa poezio kaj prozo. Antologio. Sofia Pres, 1985. 236p. 23cm. Verkoj de 53 poetoj kaj 11 prozistoj. Prezo: 15,00 gld.

Diskurso pri la metodo (1637), Kartezio. El la franca trad. Eugene de Zilah. Chapecó: Fonto, 1985. 176p. 21cm. Biblioteko de filozofio Fonto. Esperanta-franca eldono. Traktaĵo pri la metodo bone gvidi sian racion. Prezo: 16,20 gld.

D-ro Jekyll kaj S-ro Hyde, Robert L. Stevenson. El la angla trad. Fernando de Diego. Chapecó: Fonto, 1985. 96p. 21cm. Fonto-serio 8. Romano pri la perdroga disdiviĝo de la hompersoneco. Prezo: 12,00 gld.

Elektita verkaro, Hristo Botev (1848-1876). El la bulgara trad. I. Dobrev kaj I. Sarafov. Sofia: Sofia Pres, 1986. 83p. 19cm. Poemoj kaj prozaĵoj de la plej granda bulgara verkisto. Prezo: 3,90 gld.

El mia vivo, Vítězslav Nezval (1900-1958). Trad. el la ĉeĥa J. Vondroušek. Třebíč: Esperantista klubo en Třebíč, 1985. 12p. 29cm. Fragmentoj el samnoma libro. Prezo: 3,90 gld.

Esperantaj legaĵoj elektitaj. Pekino: Pekina Esperanto-Asocio, 1985. 3 vol. 130 + 148 + 145p. 18cm. Riĉa kolekto de anekdotoj, beletraĵoj kaj fakaj tekstoj kun notoj kaj vortklarigoj en la ĉina. Prezo: 9,00 gld.

Esperanta literaturo I, ĉefred. Cicio Mar. Wuhan: Eldonejo de Huazhong Universitato de scienco kaj teknologio, 1986. 134p. 18cm. Originalaj kaj tradukitaj literaturaĵoj. Prezo: 4,50 gld.

Esperanto; Textbook of the international language, R. Imbert k.a. El Esperanto trad. J. Cushing k.a., adaptita de J. Wells. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1986. 56p. 21cm. Lernolibro laŭ la zagreba metodo. Prezo: 6,60 gld.

Esperanto en Aŭstralio 1905-1985; Historio de AEA, Ray Ross. Brisbano: la aŭtoro, 1985. 117p. 26cm. ISBN 0 9595336 6 4. Prezo: 13,20 gld.

Estonto—ekologio—Esperanto, red. Hristo Marinov. Sofia: Bulgara Ekologia Societo kaj Bulgara Esperanto-Asocio, 1986. Dek unu studoj pri ekologiaj kaj futurologiaj problemoj. Dulingva (angla kaj Esperanta). Prezo: 15,00 gld.

Gebruik van het Esperanto voor praktische doeleinden (1974), Ivo Lapenna k.a. El Esperanto trad. M. Vanden Bempt. Leuven: Esperanto 2000, 1986. 21cm. Traduko de la 12a ĉapitro de *Esperanto en perspektivo*, kun ĝenerala bibliografio. Prezo: 2,70 gld.

Geschichte der Universalsprache Volapük, Johann Schmidt (1895-1977). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1986. 52p. 29cm. ISSN 0179-1060. Jubilea eldonserio IV; Interlingvistiko 7. Germanlingva historio de volapuko. Prezo: 18,90 gld.

Glacikovrita ponto, La, Ljuben Stanev. Trad. el la bulgara. Sofia: Sofia Pres, 1984. 145p. 20cm. Romano pri Georgi Dimitrov en nazia malliberejo. Prezo: 6,30 gld.

Gvidlibro pri Pekino, komp. Laj Hajlong. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 162p. Ilus. 18cm. Praktika manlibro por turistoj en la ĉina metropolo. Prezo: 5,40 gld.

Ĝenerala kibernetiko, inĝeniera kibernetiko, biokibernetiko, div. aŭtoroj, red. Péter Broczkó. Budapest: NJSZT, 1986. 210p. 22cm. ISBN 963 8431 48 2. Unua volumo de prelegoj (en Esperanto, angla aŭ franca) prezentitaj dum INTERKIBERNETIK '85. Prezo: 24,00 gld.

Ĝojoj de mia vivo, Josef Vondroušek (1904). Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1984. 98p. 20cm. Mimeo. Elektitaj tradukoj el A. Jirásek, K. Čapek kaj J. Šmíd. Prezo: 9,90 gld.

Interkultura kompreniĝo kaj internacia kulturo, div. aŭtoroj. Antverpeno: TEJO, 1986. 48p. 20cm. Labordokumento de la TEJO-seminario 1986 en Strasburgo, kun i.a. prelegtekstoj. Prezo: 5,10 gld.

Internacionalas (1871), E. Pottier (1816-1887). Vilnius: Mintis, 1985. 38p. 9cm. La proleta batalanto en ok lingvoj, i.a. Esperanto. Prezo: 9,00 gld.

Jeanne d'Arc au bûcher/Jana d'Arko ĉe la ŝtiparo, Paul Claudel. El la franca trad. André Cherpillod (1930). Nanterre: la tradukinto, 1986. 140p. 21cm. ISBN 2 90613 4 02 3. Dramo pri la lastaj vivhoroj de la sanktulino. Prezo: 21,00 gld.

Kantu! Kantu! 1, Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 160p. 18cm. Tekstoj kun muziknotoj de 10 Esperantaj, 15 ĉinaj kaj 100 alilandaj kantoj. Prezo: 6,00 gld.

Kiamaniere distingi la fungojn?/Come distinguere i funghi?, Mario Simondetti. Italigis el Esperanto G. Barbieri. Antverpeno: Edizioni Gabrielli, 1986. 62p. Ilus. 21cm. Scienca eldonserio 2. Esperanta-itala eldono. Manlibro por lerni distingi la venenajn fungojn disde la nevenenaj. Prezo: 16,80 gld.

Kie la mondo finas, A. López Luna. Buenos Aires: Amigos de López Luna, 1986. 104p. 17cm. ISBN 950 43 0827 9. Vivospertoj de la aŭtoro. Prezo: 9,00 gld.

Konvekseco en kompleksa analitiko unu-dimensia, Christer O. Kiselman. Uppsala: Upsala Universitato, 1986. 66p. 30cm. Lekciaro pri matematikaj funkcioj, kun ekzercoj kaj referencoj. Prezo: 20,40 gld.

Kuba ŝtata organizo, Domingo García. El la hispana trad. Kuba Esperanto-Asocio. Havano: José Martí, 1985. 146p. 21cm. Ĝenerala priskribo pri la organizado de la ŝtato en Kubo. Prezo: 7,50 gld.

Kvarfolio, J. Karen (trad. J. Kořínek), J. Rumler, E. Urbanová, C. Vidman. Literatura suplemento al *Paco*. Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1985. Versoj de poetoj de la praga artliteratura skolo. Prezo: 3,00 gld.

Libro de Adoro, La, Geraldo Mattos. Chapecó: Fonto, 1985. 80p. Ilus. 21cm. Fonto-serio 7. Sonetaro, daŭrigo de "La Libro de Nejma". Prezo: 12,00 gld.

Libro de Nejma, La, Geraldo Mattos. Chapecó: Fonto, 1985. 80p. Ilus. 21cm. Fonto-serio 6. Sonetaro de la brazila poeto, en kiu li prikantas sian amatinon Nejma. Prezo: 12,00 gld.

Lingvo kaj religio; Studo pri la frua esperantismo kun speciala atento al L.L. Zamenhof, Jeremi Gishron (1948). Jerusalem: Sivron, 1986. 212p. 14cm. Prezo: 36,00 gld.

Lingvokibernetiko, pedagogia kibernetiko, div. aŭtoroj, red. Péter Broczkó. Budapest: NJSZT, 1986. 156p. 22cm. ISBN 963 8431 47 4. Dua volumo de prelegoj (en angla, franca aŭ Esperanto) prezentitaj dum INTERKIBERNETIK '85. Prezo: 24,00 gld.

Mi avertas; Pledo por nova eldono de PIV sen eraroj, Ergoto de Bonaero. Buenos Aires: Argentina Esperanto-Instituto, 1986. 16p. 17cm. Listo de, laŭ la aŭtoro, malĝustaj vortoj en PIV. Prezo: 1,50 gld.

Mortinta reĝino, La (1942), Henry de Montherlant. El la franca trad. André Cherpillod (1930). Nanterre: la tradukinto, 1986. 132p. 21cm. ISBN 2 906134 01 5. Dramo en tri aktoj, okazanta en Portugalio. Prezo: 21,00 gld.

Originala romanaro en Esperanto; 68 romanoj en 80 jaroj. De 1907a ĝis 1986a (1982), Ergoto de Bonaero. Bonaero: Argentina Esperanto-Instituto, 1986. 40p. 17cm. Donitaĵoj kaj juĝoj pri originalaj romanoj. Prezo: 4,50 gld.

Plukitaĵoj, Ĝ. Ĥalil' Ĝibran'. El la araba trad. Georgo Abraham. Chapecó: Fonto, 1986. 96p. 21cm. Fonto-serio 12. Mallongaj rakontoj pri diversaj temoj. Prezo: 9,90 gld.

Pripensoj de maljunulo, Maximilien Trenner (1902-1986). Parizo: Eldono Gabrielli, 1986. 32p. 21cm. Pripensoj pri diversaj temoj, kvazaŭ rakontetoj. Prezo: 4,20 gld.

Promenado en gramatiko, Konisi Gaku (1934). Ōsaka: Japan Esperanta Librokooperativo, 1986. 104p. Ilus. 17cm. Gramatiko de Esperanto en la japana lingvo. Prezo: 12,00 gld.

Rakontoj, Jordan Jovkov (1880-1937). Div. tradukintoj. Sofia: Sofia Pres, 1986. 248p. 20cm. Tridek rakontoj de la bulgara prozisto. Prezo: 9,90 gld.

Stilekzercoj (1947), Raymond Queneau (1903). Trad. el la franca István Ertl. *La Kromkancerkliniko* 4, 1986. 20p. Mimeo. 30cm. Stilpoluraj ekzercoj de la franca superrealisto, adaptitaj al Esperanto. Prezo: 6,60 gld.

Ŝlosilo nederlanda. Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 1985. 30p. 14cm. Prezo: 1,20 gld.


Ŝtelisto de persikoj, Emilijan Stanev (1907). Trad. div. personoj. Sofia: Sofia Pres, 1985. 130p. 19cm. Noveloj kaj rakontoj de bulgara aŭtoro. Prezo: 12,00 gld.

Sur la sojlo de la amo, Markéta Procházková. El la ĉeĥa trad. Jiří Kořínek. Chapecó: Fonto, 1986. 96p. 21cm. Fonto-serio 11. Poemaro de la juna ĉeĥa poetino, kun profunde penetrema rigardo. Prezo: 9,90 gld.

Vojaĝo tra Ĉinio, komp. la redakcio de *El Popolo Ĉinio*. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 136p. Ilus. 26cm. Priskriboj de naturaj kaj homfaritaj belaĵoj de Ĉinio, kun multe da koloraj fotoj. Prezo: 30,00 gld.

Wien. El la germana trad. Aŭstria Esperanto-Movado. Flora-Print: Wien, 1986. 48p. Ilus. 24cm. Trilingva eldono, germana-angla-Esperanta. Gvidlibro kun multe da belaj koloraj fotoj. Prezo: 16,80 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!



72a UNIVERSALA KONGRESO

DE ESPERANTO, Varsovio (Pollando),

25a de julio — 1-a de aŭgusto 1987.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de LKK: p/a Pola Esperanto-Asocio,
Jasna 6, PL-00-013 Warszawa 1, Pollando

Loka Kongreso Komitato: La 22an de novembro 1986 en Varsovio okazis kunsido de la nova Konsilantaro de Pola Esperanto-Asocio, kiu elektis la Estraron de tiu landa asocio. Tiel finiĝas la maltrankvila unujara periodo dum kiu PEA estis gvidata de provizora estraro, nomita de ŝtataj organoj en oktobro 1985. La novan Estraron eniris same novaj, en pluraj kazoj junaj, kompetentaj homoj. La prezidanto de PEA nun estas Roman Dobrzyński, dum kiel vicprezidantoj elektiĝis A. Pettyn kaj A. Golonka; ĝenerala sekretario estas P. Janowczyk (prezidanto de Pola E-Junularo), kasisto iĝis Z. Banet-Fornalowa. Loka Kongresa Komitato restas senŝanĝa, sub gvido de S. Świstak. La nuna normaligo de la situacio en PEA tre pozitive influas la laboron de LKK ankaŭ pro tio, ke pluraj ĝiaj membroj ĝis nun devis okupiĝi samtempe kaj pri PEA kaj pri LKK.

Dua Bulteno: Ĝi aperos meze de februaro kaj enhavos ĉiujn bazajn detalojn pri la 72a UK kaj ĉirkaŭaj aranĝoj. Enestos ankaŭ la prezoj de loĝado, ekskursoj, bankedo ktp. La kongresanoj estas petataj ne skribi jam nun pri tiaj demandoj al la CO de UEA aŭ al LKK, ĉar ne eblas korespondi unuope kun ĉiuj.

Loĝado: LKK rezervis plurajn milojn da litoj por la kongresa semajno en Varsovio. La prezoj, **kiuj inkluzivas duonpensionon** (matenmanĝo kaj tagmanĝo aŭ vespermanĝo), estas jenaj: unulita ĉambro kun banejo — 88 ĝis 190 guldenoj (depende de hotelkategorio), unulita ĉambro sen banejo — de 53 ĝis 67 guldenoj, lito en dulita ĉambro kun banejo — de 66 ĝis 118, loko en dulita ĉambro sen banejo — 58 guldenoj; en studentaj domoj loko en unulita ĉambro kostas 43, kaj en dulita 29 guldenojn. Ĉiuj ĉi prezoj inkluzivas ankaŭ du manĝojn tage.

Vizoj kaj deviga monŝanĝo: Ĉiuj kongresanoj, kiuj *mendos kaj pagos sian loĝadon* en Varsovio pere de la konstanta kongresa adreso en Roterdamo, ricevos loĝkonfirmilon, kiu liberigos ilin de la deviga monŝanĝo ĉe la vizpeto kaj eniro de Pollando.

Ekskursoj: okazos multaj enurbaj kaj apudurbaj ekskursoj tra la tuta kongresa semajno. Urba rondveturo kostas 10 guldenojn, vizito al la palaco Wila-

nów (kun koncerto kaj vespermanĝo) prezos 90, tiu al Zelazowa Wola — naskiĝloko de Chopin — (koncerto kaj vespermanĝo) 71, kaj alia al Boguslawice (folkloro koncerto, manĝo) 104 guldenojn. Sep tutaj ekskursoj (la 29an de julio) direktiĝos al: Bjalistoko, Lodzo, Arkadia, Kazimierz Dolny, Opinogóra, Nowogród kaj Treblinka, kaj ili kostas de 53 ĝis 72 guldenojn (inkluzive tagmanĝon). Pli ol dek post-kongresaj ekskursoj celos, inter la 2a kaj 7a de aŭgusto, tutan aron da plej vidindaj lokoj (Krakovo, Gdansko, Vroclavo, Bjalistoko, Lublino, Poznano, Ĉestoĥovo ktp) kaj kostas de 192 ĝis 815 guldenojn, inkluzive ĉion, depende de la daŭro kaj itinero.

Scienca konferenco: Apud la tradicia prelegserio en la kadro de Internacia Kongresa Universitato, dum la 72a UK okazos aparta scienca konferenco, kiun preparas Centro de Esploro kaj Dokumentado kaj Akademia Centro Interlingvistika. La konferenco traktos la Centjaran Jubileon de Esperanto el kvar aspektoj: lingvistika, historia, sociologia kaj kultura.

Artaj aranĝoj: LKK havas apartan teamon, kiu sub la gvido de Ewa Siurawska pretigas nekutime ampleksan artan programon por la kongresa semajno. Ne eblas ĉi tie mencii detalojn, sed oni sciu, ke la kongresanojn en Varsovio atendas pli ol dek teatraj prezentaĵoj, dudeko da koncertoj, dekduo da ekspozicioj, publikaj festoj, akceptoj, filmprezentoj ktp. Kvankam la kriterioj por prezentiĝi dum la UK estas ĉi-foje aparte severaj, bonaj proponoj (precipe de novaj artistoj) estas ankoraŭ bonvenaj ĉe unu el la kongresaj adresoj.

Vojaĝagentejoj: UEA kunlaboras kun ORBIS, la plej granda pola turisma entrepreno, kaj kun PTTK (nur por karavanoj el orienteŭropaj landoj). Estas konsilinde, ke la kongresanoj utiligu la servojn de tiuj du agentejoj, pri kies servoj UEA subskribis kontraktojn kaj pri kies kvalito mem pretas respondi.

Oficiala flugkompanio: La pola nacia flugkompanio LOT estas la oficiala aerkompanio de la Kongreso. Ĉiuj ĝiaj oficejoj tra la mondo estas jam informitaj, ke la pasaĝeroj, kiuj povas pruvi sian kongresanecon (ekzemple, per la kongreskonfirmilo) rajtas ricevi 30%-an rabaton je ĉiuj internaciaj linioj de LOT.

Aliĝoj svarmas: Kvankam meze de januaro ankoraŭ alvenas aliĝiloj senditaj fine de decembro, eblas informi, ke al la Kongreso jam aliĝis pli ol 1 200 kongresanoj el la okcidentaj landoj kaj ĉ. 2 000 el la orienteŭropaj landoj (tiujn oni administras en Varsovio). Kun pli ol 3 000 aliĝintoj, ses monatojn antaŭ la Kongreso, ĉio ĉi signifas, ke la 72a UK fariĝos la plej granda manifestacio en nia historio



● **Brazilo:** La prezidantinoj de Brazilo Esperanto-Ligo (Néia Lúcia Souza, foto) kaj Esperanto-Asocio de Brazilo (Neima Adorno) ricevis medalojn la 6an de novembro, de la guberniestro de la federa distrikto de Brazilo. Ili troviĝis inter 70 personoj, premiitaj pro diversaj kontribuoj al la brazila ĉefurbo.


● **Aŭstralio:** La Aŭstralio Esperanto-Asocio lanĉis sian celebradon de la Jubilea Jaro per nacia konferenco kaj somerlernejo en Armidale, NSW. Prezidis la publikan manifestaĵon profesoro Ronald Gates, antaŭa universitatestro kaj prezidinto de la nacia Unesko-komisiono, kiu lernis Esperanton speciale por tiu aranĝo. Ĉeestis ankaŭ Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, kies viziton subvenciis la aŭstralia ŝtato kadre de la Internacia Jaro de Paco.

● **Hispanio:** *Africa*, hispana monata revuo priafrika, aperigis en sia oktoobra numero artikolon de Arnau Torras i Tutusaus, titolitan "Esperanto, solvo de la kultura dependeco". La artikolo baziĝis sur anonco de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo en *Kontakto*, n-ro 96, kaj instigis ĝian verkadon kaj publikigon Kataluna Esperanto-Junularo.

● **Islando:** Okaze de la Zamenhof-tago en decembro, Islanda Esperanto-Asocio eldonis 16-paĝan grandformatan ĵurnalon en la islanda, kiu prezentis viglan bildon pri tre diversaj aspektoj de la Esperanto-movado. Alia aparte sukcesa flanko de la projekto estis la varbado de anoncoj de multaj islandaj firmaoj. Redaktis la numeron Árni Bödvarsson, Baldur Ragnarsson kaj Hallgrímur Saemundsson.

● **Ĉinio:** S-ro Xu Daorong, gastpreleganto ĉe Universitato Guangzhou, raportas pri lastatempa stablo de ties poŝta kurso en Esperanto, kun pli ol 1900 partoprenantoj. Li antaŭvidas starigon de la unua universitat-nivela Esperanto-fako en Ĉinio en Guangzhou, eble post du jaroj.

● **Hungario:** Okaze de la Printempa Budapeŝta Festivalo, la Nacia Biblioteko de Hungario aranĝos ekspozicion titolitan "La vojo de la Esperanto-libro en Hungario". La ekspozicio konsistos el la kolekto de Károly Fajsz, kiu ampleksas pli ol 7000 librojn kaj 3000 binditajn jarkolektojn de revuoj (jam de 1982 sub ŝtata protekto).



● **Malto:** La 15an de decembro Esperanto-Societo (Malto) festis sian 25-jaran datrevenon, kaj samtempe disdoniĝis premioj pro tradukoj de maltaj poemoj en Esperanton. En nova, ĉefe maltlingva poezirevuo *Versi*, eldonata de la Societo de Maltaj Poetoj, jam aperis dufoje poemoj en Esperanto aŭ tradukitaj el Esperanto maltlingven. Lastatempe ankaŭ aperis *Antologio de Maltaj Poetoj* (mendebla de Svisa Esperanto-Federacio), redaktita de d-ro Carmel Mallia (foto, dekstre). Tiaj kulturaj iniciatoj vekis senciĝe grandan atenton en la insulo.

Nekrologoj

LUCIEN BANNIER (1893-1986), unu el la gvidantoj de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) dum pluraj jardekoj, mortis la 20an de novembro en Francio. Kolego de Eugene Adam (Lanti) ekde 1918, li partoprenis en la fondo de SAT en 1921, kaj kun Norbert Bartelmess direktis la aferojn de la Asocio tra malfacilaj periodoj ĝis emeritiĝo kiel prezidanto en 1969. Pro liaj fideleco kaj lojaleco al la idealoj de Lanti, oni epitetis lin "La konscienco de SAT".

RUDOLF JOCHMANN (1902-1986) forpasis pasintjare en Grafing, FR Germanio, kie li estis delegito kaj fakdelegito pri konstruado, lia profesio.

ADOLFO AUGUSTO NUNES (1895-1986) mortis la 4an de septembro en Lisbono, Portugalio. Tre aktiva en la portugala movado, li aŭtoris multajn artikolojn kaj tradukojn el la

portugala. Li finpretigis manuskripton de Esperanto-portugala vortaro tuj antaŭ sia morto.

RENÉ NIZIET (1924-1986), delegito en Huy, Belgio, kaj fakdelegito pri ekologio kaj valona etnismo, forpasis meze de la pasinta jaro.

ALICE MÜLLER (1903-1986) mortis lastatempe en Ĝenevo, Svislando. Aktiva esperantisto dum multaj jardekoj, ŝi unue renkontis la lingvon en kurso de Edmond Privat en 1918, kaj fariĝis amiko ne nur de li sed de Andreo Cseh, P.E. Stojan kaj aliaj elstaraj figuroj de la movado.

RON OGRAM (1944-1986), vicdelegito en Otavo, Kanado, kaj fakdelegito pri kvakerismo, mortis pro koratako en julio.

A.J. LEATHER, delegito en Carnforth, Britio, kaj fakdelegito pri kvakerismo, forpasis en novembro.

HELMUT SONNABEND (1924-1986), prezidanto de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) dum pli ol dek jaroj, forpasis la 6an de decembro en FR Germanio. Profesie lernejestro, li dediĉis sian Esperantokarieron al problemoj de instruado; krom multaj konferencoj k.s. organizitaj de li, li postlasis unu libron, *Esperanto: Lerneja eksperimento* (Edistudio, 1979).

RENÉE VOLPELIERE (1902-1986) forpasis la 15an decembro en Nîmes, Francio, kie ŝi estis delegito. Dum dek kvin jaroj fakdelegito pri mondoglobalismo kaj mondoglobalitanejo, ŝi ankaŭ regule kaj malavare kontribuis al la Novjorka Oficejo de UEA por subteni la laboron ĉe UN.

● **Nefumantoj:** (aŭ ĉu nefumismo?) — En la 30a Internacia Seminario en FR Germanio kunvenis grupo de nefumantoj, kiu petas la jenon: La organizantoj de ĉiu Esperanto-kongreso aŭ -renkontiĝo zorgu, ke nefumantoj laŭeble ne ricevu fumon en siajn pulmojn. Do, ni proponas: 1) limigi la lokojn kie oni rajtas fumi, kaj aparte zorgi ke la fumejoj ne estu uzendaj ĝenerale; (2) klare sciigi al la partoprenantoj la ĉi-koncernajn regulojn. Haveblas modela letero kaj pliaj informoj ĉe P.O. Kesto 2310, NL-1000 CH Amsterdam, Nederlando.

● **Remado:** Dum 31 jaroj okazis la aranĝo Internacia Danuba Remado (IDR), en kiu dum du monatoj oni veturas per remboatoj pli ol 2000 kilometrojn de Germana DR ĝis Bulgario. Nur unuopuloj partoprenas la tutan vojaĝon, sed multaj remas unuopajn

sekciojn, ekzemple tra unu lando. Esperantistoj kiuj interesiĝas pri venontjara partopreno, skribu al Danuba Remado, PK 45, BG-1090 Sofia, Bulgario.

● **Filatelo:** Ĵus aperis detaloj pri la jubilea poŝtmarko de Kubo, kiu aperos la 16an de marto. Aparte interesa filatela eco estas ĝia enkorpo de alia Esperanta poŝtmarko, de 1927 el Sovetio.



● **Naturfotado:** Nederlandano Anton Blickman skribas, ke dum sep jaroj li okupiĝis pri tridimensia naturfotado en la proksimeco de 30-200mm, kaj ellaboris specialan teknikon pri tio. Li interesiĝas pri Esperanta korespondado kun aliaj fakuloj — aparte pri tridimensia kaj proksima fotoarto, orkideoj kaj papilioj. Skribu al li ĉe: Palamedesstraat 17, NL-2026 VV Haarlem, Nederlando.

● **Bibliografio:** Denove aperis Esperanto-ĉapitro en la granda jara bibliografio de la usona Asocio pri Modernaj Lingvoj (MLA), kiu ĵus aperis por la jaro 1985. La plej granda koncentriĝo de verkoj en kaj pri Esperanto aperas en la tria volumo (el entute kvin), en ĉapitro "Helplingvoj: Internaciaj lingvoj". La ĉapitro ampleksas 310 erojn pri Esperanto, ĉefe pri ĝia lingviko, kiuj estas detale analizitaj kaj indeksitaj (ioma kresko kompare kun 286 eroj en 1984). *1985 MLA International bibliography of books and articles on the modern languages and literatures* estas konsultebla en ĉiuj ĉefaj esploraj bibliotekoj de la mondo.

● **Literaturo:** La Internaciajn Florajn Ludojn 1986 en Katalunio gajnis anglo Timothy Brian Carr, per sia poemo *La unua printempo*. Aliaj premiitoj estis W. Gunther (FR Germanio), Carmel Mallia (Malto) kaj Antonina Apollo (Estonio/Sovetunio). La premiojn oni transdonis kadre de la 22a Kataluna Kongreso de Esperanto en Leida, komence de novembro. Detaloj pri la jubilejara konkurso haveblas de Joan Ramon Guinon i Roset, carrer Guifré 6, 3r, 2a, E-08001 Barcelona, Katalunio, Hispanio, kien oni ankaŭ sendu konkursaĵojn ĝis la 31a de majo.

● **Tonkin:** La 19an de decembro en Vaŝingtono, la usona ĉefurbo, okazis akcepto honore al d-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA. Ĉeestis reprezentantoj de naciaj edukaj organizaĵoj, interalie la direktoro de la Konsilio por la Internacia Interŝanĝo de Esploristoj (gvida instanco de la konata Programo Fulbright), de kiu d-ro Tonkin estas estrarano, kaj la direktoro de la Nacia Asocio pri Agado por Eksterlandaj Studentoj. La ĉefĵurnalo Washington Post poste aperigis artikolon kaj foton pri la akcepto, kiun organizis Esperanto-Societo de Vaŝingtono.

● **Hirsch:** Fine de la pasinta jaro, 62-jara komercoficisto Richard Hirsch ricevis medalon de la Prezidanto de FR Germanio, honore al sia agado en kaj per Esperanto. S-ro Hirsch unue lernis pri Esperanto kiel militkaptito en Sovetunio en 1945, kaj ekde 1949 senĉese aktivis por la lingvo. Inter multaj postenoj kaj taskoj plenumitaj de li, menciindas komitataneco en UEA, periodo kiel ĝenerala sekretario de Germana Esperanto-Asocio, kaj administrado de la delegita reto, Societo Zamenhof kaj la Fondaĵo Canuto.



La foto montras anojn de la klubo "La Verda Stelo" el Kuilu-Ngongo, Zairio. Kontakti tiun tre simpatian grupon, skribu multnombre al s-ro Tunga-Mavomo Mafuila (la prezidanto, staranta meze), B.P. 122, Kuilu-Ngongo (Bas-Zaïre), Zairio.

● **Afrika literaturo:** Ĵus aperis la unua literatura verko en Esperanto el Angolo: *Brulo kaj rimo*, poemaro de la fama poeto kaj angola ŝtatestro Agostinho Neto, en traduko de angolano Lutumba Tima. La tradukadon instigis Esperanto-klubo de Norrköping (Svedio), kadre de sia "afrikĝemela" agado; simile, la eldono rezultis el la kunlaboro de Vulpo-libroj (Nederlando) kaj Internacia Kultura Servo (Jugoslavio). La librolanĉon en Zagreb ĉeestis reprezentanto de la angola ambasadejo en Jugoslavio, kaj oni donacis la unuajn ekzemplerojn al jugoslavaj instancoj pri evolulandoj.

● **Turismaj prospektoj:** Lastatempe ni ricevis ekzemplerojn de urbopriskriboj en Esperanto pri Bünde, FR Germanio, Vieno, Aŭstrio, Sabadell, Hispanio, kaj Torino, Italio. Aparte menciinda estas gvidlibro pri la Norvega Fervojmuzeo en Hamar: ĝi ne nur entenas Esperantan tekston, sed estas utiligota, laŭ la muzekuratorio, Per Johan Krogstie, por tradukoj en dek unu aliajn lingvojn fare de alilandaj esperantistoj.

Fakestro pri asekuro, ankaŭ teatra aktoro kaj membro de "La Verda Stelo", ŝatus ricevi leterojn/bildkartojn el la tuta mondo: skribu al s-ro Ngonde Nkodia, Compagnie Sucrière, B.P. 122, Kuilu-Ngongo (Bas Zaire), Zairio.



Adresaro 1987 de "Tutmonde". Pacifista Movado "Tutmonde" eldonos adresaron sendotan senpage, laŭeble kun personaj fotoj. Skribu al: Apartat 313, E-08220 Terrassa, Hispanio.

Informoj pri artefaritaj seksŝanĝoj serĉas Rudolf Jax, Linzer Bundesstr. 67c, 5023 Salzburg, Aŭstrio; ankaŭ eblecojn labori kiel presisto en Esperanto-centro (parolas germane, angle, Esperante; krom presado, iom kompetentas pri elektro-tekniko).

Salutleterojn kaj korespondopetojn el la tuta mondo bonvenigas Esperanto-kursanoj de M. Almaŝi, str. Nikole Tesle 11/18, YU-24300 Bačka Topola, Jugoslavio.

Grupo de geknabaj komencantoj (12-14 jaraĝaj) atendas instigajn leterojn kaj korespondopetojn ĉe "Esperanto", Osmogod. skola "Miloje Ciplić", YU-23272 Novi Beĉej, Jugoslavio.

Por vortara laboro urĝe serĉas Esperantan Duden-bildvortaron (red. Eichholz), bonvenigas ofertojn Karel Kraft, Zupanovice 49, 262 15 Borotice, Ĉeĥoslovakio.

Helpo pri klakdanc-lernolibro/figuroj/muziko serĉas L. Brassem, Fazantstraat 113, 7481 BJ Haaksbergen, Nederlando.

Por organizado de Esperanto-kursoj petas lernolibrojn kaj revuojn Asocio de Esperanto en Maŝhado (AEM), Djavad Kamali, Saadabad Szuare, Pars pharm., Mashhad 91846, Irano.

Oficiala Informilo

KOREKTO: JARLIBRO 1986

Pro teknika misfunkcio ĉe la transdono de informoj el la komputilo al la kompostmaŝino, en la malfrue aperinta *Jarlibro 1986* aperis pluraj eraroj en la adresoj, kiuj enhavas duoblajn literojn aŭ ciferojn. Pro eraro ĉe la enpaĝigo de la Jarlibro, ne aperis ĉ. duono de la delegitaj adresoj en Svedio (mankas ĉio post Malmö) kaj elfalis kelkaj delegitaj adresoj fine de Italio. En la paĝoj kie troviĝas la delegita reto de FR Germanio aperis malĝusta formo de la landonomo. La nura efika korekto de tiuj bedaŭrindaj misaĵoj estas la klopodo, ke *Jarlibro 1987* aperu kiel eble plej frue. Ni nun strebas ĝian publikigon en la fino de marto, tiel ke ĝi atingu la membraron dum aprilo. Pro la eraroj en la Jarlibro 1986 ni sincere pardonpetas, precipe al la svedaj, germanaj kaj italaj delegitoj.

DONACOJ 1986 (gld.) ĝis la 31-a de decembro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Aŭstralio: M.M. Chaldecott 112,55.

Britio: E. Fowden 33,36. Finnlando: Tapio Sormunen 100,00; A. Kosonen 80,50; H. Kosonen 80,50. Japanio: Ŝ. Jamato 110,50; H. Tutida 80,50. Nederlando: O. Hoekstra 500,00; E.J. Woessink 1000,00; J.C. v. Tinteren 400,00; N.J. v. Iperen 50,00; A.J. Middelkoop 150,00; I.M.J. Dijkhoff-Lenze 100,00; S.A.K. v.d. Zee 50,00. Svedio: J. Hammarberg 20,00. Sumo pasintjara 6573,55.

FONDAĴO CANUTO: Aŭstralio: M.M. Chaldecott 112,50. Belgio: S. De Weerd 80,26. Nederlando: R. Slot 160,00; E.J. Woessink 2000,00; H. Bakker (filo) 1000,00; S-inoj J.C. v. Tinteren 200,00; E.M. Maasbommel 100,00; A.J. Middelkoop 150,00; S.A.K. v.d. Zee 50,00. Sumo pasintjara 5444,97.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): F.R. Germanio: Esperanto-Blindulligo de Germanio 218,46. Italio: R. Corsetti 50,00. Sumo pasintjara 268,46.

ĜENERALA KASO: Kanado: B. Salt 3292,18. Nederlando: "Merkurio"

200,00; O. Hoekstra 500,00; W. Akkermans 57,50; I.M.J. Dijkhoff-Lenze 100,00; S.A.K. v.d. Zee 50,00. Diversaj malgrandaj 17,45. Sumo pasintjara 10165,83.

ASOCIA KAPITALO: Heredaĵo Agnes Curtis 680,76. Sumo pasintjara 19430,76.

JUBILEA JARO: Nederlando: E.M. Maasbommel 50,00; A.J. Middelkoop 85,00; S.A.K. v.d. Zee 50,00. Sumo pasintjara 2551,97.

FONDAĴO TEJO: Naturamika Tendaro 44,00. Aŭstralio: M.M. Chaldecott 112,50. Nederlando: O. Hoekstra 500,00; S-ino E.M. Maasbommel 100,00. Sumo pasintjara 767,90.

FONDAĴO WÜSTER: Aŭstralio: M.M. Chaldecott 112,50. Anonimaj donacoj 1128,45. Sumo pasintjara 3493,60.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Finnlando: U. Hakamäki 100,00. Japanio: Ŝ. Jamato 300,00. Svedio: J. Lokna 90,00. Svislando: R. v. Puijenbroek 31,15. Sumo pasintjara 521,15.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



Ĉiujn informojn pri radio bonvolu sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat,

F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendhoroj laŭ la Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

ĈIUTAGE

05.30-06.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27 (7270 kHz). Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

11.00-11.25 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.05m (9525 kHz).

11.00-11.30 Pekino, 43.13m (6955 kHz), 31.64m (9480 kHz). Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.

13.00-13.30 Pekino, 25.75m (11650 kHz), 19.50m (15385 kHz).

15.30-15.55 Varsovio, 41.18m (7285 kHz), 31.01m (9675 kHz).

16.30-16.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

19.30-20.00 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 32.03m (9365 kHz), 30.10m (9965 kHz).

21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

22.30-23.00 Pekino, 30.43m (9860 kHz), 26.05m (11515 kHz).

LUNDE

17.30-17.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

MERKREDE

01.15-01.25 Berno, 48.90m (6135 kHz), 31.17m (9625 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

03.15-03.25 Berno, 48.90 (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

07.45-07.55 Berno, 31.38m (9560 kHz), 30.35m (9885 kHz), 25.20m (11905 kHz), 19.27m (15570 kHz).

10.45-10.55 Berno, 31.04m (9665 kHz), 30.40m (9870 kHz), 25.43m (11795 kHz), 19.27m (15570 kHz).

13.15-13.25 Berno, 30.83m (9730 kHz), 30.35 (9885 kHz), 25.20m (11905 kHz), 25.09m (11955 kHz),

19.27m (15570 kHz).

15.15-15.25 Berno, 30.35m (9885 kHz), 25.34m (11840 kHz), 25.14m (11935 kHz), 19.44m (15430 kHz).

17.15-17.25 Berno, 31.46m (9535 kHz), 31.02m (9670 kHz), 30.35m (9885 kHz), 25.09m (11955 kHz), 24.93m (12035 kHz).

22.15-22.25 Berno, 50.29m (5965 kHz), 31.17m (9625 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

ĴAŬDE

06.00-06.15 Vatikano, 186m (1611 kHz), 48.00m (6250 kHz), 41.38m (7250 kHz), 30.75m (9755 kHz), 25.61m (11715 kHz). Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

17.30-17.40 Berno, kiel lunde.

SABATE

17.30-17.40 Berno, kiel lunde.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz), 31.33m (9575 kHz). Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, Centro Corrispondenza, I-00100 Roma, Italio.

Berno, kiel merkrede.

DIMANĈE

05.35-05.50 Vieno, 50.46m (5945 kHz), 50.00m (6000 kHz), 48.74m (6155 kHz), 25.36m (11830 kHz). O.R.F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.

09.30-09.45 Vieno, 50.00m (6000 kHz), 48.74m (6155 kHz), 41.61m (7210 kHz).

12.05-12.15 Budapeŝto, M.F. 67.04 MHz, 67.97 MHz, 68.24 MHz, 68.36 MHz, 68.48 MHz, 68.72 MHz, 69.38 MHz, 70.10 MHz, 70.43 MHz, 70.64 MHz, 72.08 MHz. Programo preparita de Radio Pécs, Esperanto, Pf. 200, H-7601 Pécs, Hungario.

20.00-20.10 Vatikano, 570 (526 kHz), 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.00m (6250 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj MF 93.0 MHz, 96.5 MHz. (ankaŭ je festotagoj).

22.45-23.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

DIREKTITAJ ONDOJ

Berno: je la 01.15h al Centra kaj nordo de Suda Ameriko; je la 03.15h al Centra kaj Norda Ameriko; je la 07.45h kaj 10.45h al Malproksima Oriento; je la 13.15h al Oriento; je la 15.15h al Proksima Oriento; je la 17.15h al Arabio kaj Afriko; je la 22.15h al Suda Ameriko. **Pekino**: je la 11.00h al Japanio kaj Koreio; je la 13.00h al Sudorienta Azio; je la 20.00h al Eŭropo; je la 22.30h al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 1530, 9625, 11700 kaj 15120 kHz je la 20.00h al Afriko. **Vieno**: 11830 kHz al Proksima Oriento; 6155 kHz al okcidenta Nord-Ameriko.

SEZONA HORŜANĜO

Ekde la 29a de marto 1987 la elsendoj el Berno (nur la eŭropa programo je 17.30h), Budapeŝto, Vatikano, Zagrebo estas aŭskulteblaj horon pli frue laŭ UTC.

ALIAJ STACIOJ

(urba aŭ regiona aŭdebleco)

Brazilo: Sorokaba (ZYK669), 1080 kHz, vendrede, 21.00-22.00h; **Rio de Ĵanejro** (ZYJ462), 1400 kHz, dimanĉe, 19.30-19.45h (Brazila Spiritisma Federacio).

Hispanujo: Kordovo, 94.3 MHz, sabate, 12.00-12.20h (Radio Libera Lupeo).

Italujo: Verono, 1621 kHz, 100.5 kaj 100.8 MHz, lunde kaj ĵaŭde, 22.30-22.40h (Radio International). Horoj laŭ *loka tempo* por ĉi tiuj stacioj.

Aŭskultu kaj reagu

Dum 1986 okazis 5 266 Esperantaj radioelsendoj, kiuj daŭris 2 048 horojn. Ĉiuj detaloj troviĝas en la ĉi-supra tabelo. Konsciu, ke tiuj elsendoj dependas de sia populareco ĉe la aŭskultantoj, do **skribu foje al radio-stacio!**

KURS-PROGRAMO 1987

SEMINARIOJ KAJ FERIOJ

9-14 feb. D-ro Dirk Willkommen: *Andersen kaj Esperanto.*

16-21 feb. D-ro Eugene de Zilah: *Pensmanieroj okcidenta kaj orienta.*

13-18 apr. Claude Gacond: *Intensiva pretiĝo al trapaso de Esperanto-ekzamenoj.*

18-20 apr. Claude Gacond: *La montaro Ĵuraso ekprintempe (promenadoj).*

18-23 maj. Karl-Ernst Paech: *La Go-Ludo (eklerno kaj spertiĝo).*

6-8 jun. Inĝeniero Johann Pachter: *1-a studsemajnfino pri arbaro.*

8-13 jun. B. Eichhorn & R. Bossong: *3-a seminario pri la nomoj de sovaĝaj plantoj*

13-18 & 20-25 jul. Claude Gacond: *Esperantoferiado por infanoj kaj familioj.*

10-15 aŭg. E. Borsboom: *Legindaj libroj en Esperanto ekster la belliteraturo.*

17-22 aŭg. *Lertiĝo en la tradukarto, en la franca*

kun Georges Lagrange, el la germana kun d-ro Dirk Willkommen.

17-22 aŭg. D-ro Giorgio Silfer: *La Dia Komedio — fundamento de la literaturaj lingvoj itala kaj Esperanta.*

17-22 aŭg. Perla Martinelli: *Ĵurnalisma grafiko.*

7-12 sep. Claude Gacond: *Eŭropa Ferio-Semajno Fervojema.*

19-21 sep. Claude Gacond: *Piedira migrado tra Ĵuraso.*


26-31 okt. Pastro Bernhard Eichkorn: *1-a Kristana Kultur-Semajno Esperantista.*

26 dec. - 3 jan 1988: Claude Gacond. *Vintro-Feriado: Promen-skiado kaj prelegoj.*

Petu la detalajn informilojn al Kultura Centro Esperantista, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Tel.: +41 39 26 74 07.

ESPERANTO-STAGĜOJ POR KOMENCANTOJ KAJ PROGRESANTOJ

16-21 feb. 23-28 mar. 20-25 apr. 18-23 maj. 9-13 kaj 22-27 jun. 13-18, 20-25 jul.
27 jul - 1 aŭg. 3-8, 10-15, 17-22 kaj 24-29 aŭg. 21-26 sep. 19-24 okt. 23-28 nov. 21-26 dec.



VESPERO JAM FARIĜIS

60 desegnaĵoj kaj 180 robajoj, Paderborn 1985, 128p., kartonita, gm 16,80

»Rare nekutima libro de maljunulo, kiu multon trasuferis, multon komprenis kaj la homojn profunde ekkonis.« (Nicolino Rossi)

»La robajo-versoj elparolas verojn kaj sentojn, al kiuj doni tiom perfektan formon kaj esprimoriĉan enhavon nur tre malmultaj homoj kapablas.« (Heinrich Nischwitz)

»Paĝon post paĝo mia miro kaj admiro pligrandiĝis.« (Berengere Cheverry)

TRI GRAVAJ LIBROJ DE Rikardo Ŝulco

PLEDO POR UNUECO LINGVO

Esperantologiaj artikoloj kaj eseetoj, Paderborn 1985, 288p., bindita, gm 45,-

»Ĝi estas ekstreme teda.« (Jouko Lindstedt)

»Pledo estas la plej interesa libro, kiun mi iam ajn legis en Esperanto, kaj la plej instrua.« (Hermann Behrmann)

»La aŭtoro senindulge atakas ĉion, kio emas al la disdialektigo de la lingvo, ĉion, kio rompas ties unuecon.« (Félix Gargía Blázquez)

»Rikardo Ŝulco metode provokas nin al pli preciza pensado. Min ravas lia kristale klara maniero de diskutado.« (Karel Kraft)

»PLEDO POR UNUECA LINGVO meritas esti atente trastudata de multaj samideanoj, kiuj deziras plibonigi, pligustigi kaj tiel plibeligi sian Esperanton.« (Anton Doll)

»Pledo havas neniun valoron kiel lingva studo.« (Fernando de Diego)

»Ne imageble estas konsideri lingvistike Esperanton ne legante tiun verkon.« (Walter Zelazny)

»Mi purĝoje tralegis la libron PLEDO POR UNUECA LINGVO kaj ĉiam denove revenas al ĝi.« (Michelić Lucijan)

WAS NUN ESPERANTO BETRIFFT...

Zehn Lebensjahre für die Internationale Sprache mit Grußworten von Hermann Behrmann, Prof. Dr. Helmar Frank, Helmut Klünder, Luis Mimó Espinalt. Herausgegeben zum 80. Geburtstag des Autors von Heinz M. Bleicher. Gerlingen 1986, 248 S., Kartoniert, DM 19,80

Das Buch enthält eine Auswahl von 20 der wichtigsten Artikel von Richard Schulz, darunter seinen grundlegenden Vortrag vom Weltkongreß in Augsburg.

KCE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

La urbo LA CHAUX-DE-FONDS situas je 1100 m en ĵurasa montaro. Ĝi metas je ĉies dispono:

- *sian tegmentitan naĝejon*
- *sian tegmentitan Rajdan Centron*
- *siajn ski-vojojn nokte lumigitajn (por promenad-skiado kaj alvala skiado)*
- *sian koncertejon*
- *sian teatron*
- *sian "Klubon 44" (por prelegoj kaj aliaj kulturaj-klerigaj aranĝoj)*
- *sian mirindan horloĝ-muzeon*
- *siajn best-ĝardenon kaj "Vivarium"*
- ...*kaj por la noktemuloj siajn kabaredojn kaj dancejojn!*

Venu ferii kaj restadi ĉe la **Gastejo Edmond Privat** de **Kultura Centro Esperantista** por malkovri tiun urbon kaj ties agrablan ĉirkaŭaĵon! Petu la detalajn informojn.

Kultura Centro Esperantista

Pf. 771

CH-2301 La Chaux-de-Fonds

tel. (el eksterlando) + 41 39 26 74 07

tel. (el Svislando) 039 26 74 07

ESPERO POR SENESPERA MONDO:

Jen tre grava kaj urĝa mesaĝo pri la konfuzita mondo. Skribu por senpaga libreto al: **INTERNACIA BIBLIO-MISIO**, 29 Plantation Road, Poole, BH17 7LN, Britujo.

La Edinburgh Prelegoj pri Mensa Scienco

de Thomas
Troward

mortinta divizia juĝ-
isto, Punjab, Hindio

El la amaso de religiaj libroj en Esperanto, la verko de Thomas Troward estas la sola, laŭ mia scio, kiu traktas la diferencon inter la indukta kaj dedukta rezonado, kaj ties rilaton inter la objektiva kaj la subjektiva mensoj. Kiel regi vian propran vivon, kaj sekve vian destinon, estas la celo de Mensa Scienco.

Havebla de la Libroservo de UEA, prezo 21 gld., aŭ de la tradukinto/eldoninto Elwyn C. Pollock, P.O. Box 732, Morongo Valley, CA 92256, Usono, prezo US\$7.

Fokuso

64 paĝoj, 22 × 15,5 cm
Jarabono ĉe UEA 24 gld.

*Kvaronjara
popularscienca
magazino*

SENPAGA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368
Budapest, Hungario

HERALDO DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

De 67 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 17,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (40 guldenoj; por Nederlando 42,50 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, E-28036 Madrid 16, Hispanujo

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

